der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

19. Jahrgang | Nr. 122 (6/1983) | ISSN 001 4-0619 | 30 Pf

Okaze de la Karl-Marx-jaro 1983

Karl Marx kaj Friedrich Engels pri la „langue universelle"

1. „Universala lingvo" kaj „internacia lingvo"

1983 estis proklamita la Karl-Marx-jaro. Marx, unu el la plej grandaj pensuloj de la homa historio, naskiĝis 1818 kaj mortis 1883. Do 1983 oni omaĝis al heroo kaj pro la 165a naskiĝtago kaj la 100a mortotago. Konsiderante, ke la verko de Marx ne estas disigebla de tiu de Engels, estus interese demandi sin, kiun rilaton la du klasikuloj de la marksismo-leninismo havis al la problemo de internacia lingvo, se entute ili havis rilaton al ĝi. Verŝajne iom kleran respondon ni ne ricevus, se ni nur serĉus iujn citojn pri tio. Ni ankaŭ devas konsideri la rilatojn de Marx kaj Engels entute al la lernado kaj utiligado de fremdaj lingvoj. Plue ni devas konsideri, ke la esprimo „internacia lingvo" ankoraŭ ne estis disvastigita dum la tempo de ilia vivo. Oni skribis pri la „universala lingvo" kaj ĉefe celis pri lingvo sola, kiu estus parolata de la tuta homaro, kiel oni trovas aludojn en malnovaj sociaj utopioj[1]) aŭ kiel DESCARTE, LEIBNIZ kaj aliaj[2]), kiuj unuavide rigardis la kreendan lingvon helpilo por pli racia, pli „ĝusta" pensado. Krome oni komprenis sub „universala lingvo" ankaŭ la duan lingvon la „helplingvon", kiun oni lernus kaj uzus apud la gepatra. SCHLEYER nomis sian Volapük „Universalsprache für alle Erdbewohner", kvankam li pensis fakte pri dua lingvo, uzenda apud la gepatra. Tamen, la termino estas ankaŭ uzata en la klasika verko de COUTOURAT/LEAU[3]) kaj eĉ en la moderna libro de BAUSANI[4]). Sed kaj COUTOURAT/LEAU kaj BAUSANI kompreneble sciis distingi inter la universala lingvo por la lingve unueca homaro sur unu flanko kaj la internacia (do dua) lingvo sur alia flanko. Interese estas, ke la komplementiga verko de COUTOURAT/LEAU 1907 jam portas en la titolo la esprimon „Langue internationale"[5]).

En la verkoj de Marx kaj Engels ni ne trovas indikojn, ĉu ili konsciis pri la ebla malsama signifo de „universala lingvo" kaj „internacia lingvo".

2. Lingvoprojektoj en la tempo de Marx kaj Engels

Ke Marx kaj Engels daŭre en la praktiko konfrontiĝis kun la lingva problemo, estas konate. Ili venkis la problemon lernante multajn lingvojn. Pri ilia eminenta scio de fremdaj lingvoj oni trovas multajn indikojn en iliaj verkoj. Lastatempe aperis libro pri la sinteno de Marx kaj Engels pri lingvo, stilo kaj tradukado, en kiu oni kolektis multan interesan materialon[6]).

Al la demandoj antaŭe starigendaj apartenas ĉu entute en la tempo de Marx kaj Engels la problemo de universala (aŭ internacia lingvo) jam ekzistas en la publika konscio, kaj ĉu jam estis konataj iuj konkretaj projektoj. Nu — la problemo de universala lingvo certe nur en limigita grado estis en la publika konscio, eble nur ĉe relative malmultaj pensuloj kaj verkistoj.. Oni ne povas diri, ke en la tempo de Marx (1818 — 1883) kaj Engels (1820 — 1895) la problemo de internacia lingvo estis forte debatita kvazaŭ internacie solvenda tasko.

Tamen, oni skribis pri ĝi kaj publikigis projektojn. Laŭ DULIČENKO (1982, 289) ĝis 1900 jam estis aperintaj ĉirkaŭ 340 projektoj de pazigrafioj aŭ pazilalioj (= planlingvoj)[7]). Al tiuj i. a. apartenas la iom pli konataj Solresol (SUDRE, 1866), la pazigrafioj de BACHMEIER (1852), DAMM (1876), la Universalsprache de PIRRO (1868) kaj, ne laste Volapük de J. M. SCHLEYER, kiu publikiĝis 1879, kaj aparte pri Volapük oni multon skribis. Marx jam mortis 1883, do eble ne plu rimarkis la fortiĝantan propagandon pri Volapük. Engels vivis ĝis 1895. En la jaroj 1884, 1887 kaj 1889 okazis Volapükkongresoj (Friedrichshafen, München, Paris). 1887 aperis Esperanto. Pri Volapük aparte kaj pri Esperanto sole nur Engels povis ion scii, almenaŭ teorie. Sed en la verkoj de Marx kaj Engels nenie oni trovas eĉ la vortojn Volapük aŭ Esperanto.

Tamen ni konkludu, la problemo de universala aŭ internacia lingvo principe povis esti konata al Marx kaj Engels.

3. Marx kaj Engels pri la problemo de lingva komunikado

Engels komprenis multajn lingvojn. 1839 li skribis: **„Bei der Gelegenheit hab' ich Türkisch und Japanisch gelernt und verstehe somit 25 Sprachen!"** (MESSÜ, 571[8]). Ĉe tiu okazo mi lernis la turkan kaj la japanan kaj tiel komprenas 25 lingvojn). Kaj li ankaŭ aparte mencias la neceson daŭre lerni pligrandiĝantan nombron de fremdaj lingvoj kaj skribas 1893: **„Die Ansprüche der Internationalität wachsen mit jedem Jahr. Bis 1848 konnte man glauben, genug getan zu haben, wenn man die Hauptsprachen von West- und Zentraleuropa einigermaßen verstand, aber nun ist es dahin gekommen, daß ich auf meine alten Tage sogar noch Rumänisch und Bulgarisch lernen muß, wenn ich dem Vormarsch des Sozialismus nach Osten und Südosten folgen will ... Es hat mich sehr gefreut, Plechanows Arbeiten bulgarisch übersetzt zu sehen".** (MESSÜ 563. La postuloj de la internacieco kreskas kun ĉiu jaro. Ĝis 1848 oni povis kredi esti farinta sufiĉe, se oni pli malpli komprenis la ĉefajn lingvojn de Okcidenta kaj Centra Eŭropo, sed nun la aferoj evoluis tiel, ke mi en mia granda aĝo eĉ devas lerni ankoraŭ la rumanan kaj bulgaran, se mi volas sekvi la antaŭenmarŝon de la socialismo al oriento kaj sudoriento ... Mi ĝojis vidi tradukitaj bulgaren la laborojn de Plehanov).

Kaj aliloke Engels mencias, (1885) ke la lingvolernado estas pena: **„Ich lese Russisch ziemlich mühelos, wenn ich mich eine Woche damit beschäftigt habe. Aber manchmal kann ich das ein halbes Jahr lang nicht, dann verliere ich die Übung und bin gezwungen, es gewissermaßen von neuem zu lernen"** (MESSÜ 579: Mi sufiĉe senpene legas la rusan, se mi okupiĝis pri ĝi dum unu semajno. Sed foje mi tion dum duona jaro ne povas fari, tiam mi perdas la praktikon kaj estas devigita, eklerni ĝin kvazaŭ denove). Interesa estas la konstato de Engels pri la malkoniga efiko de lingva izoliteco. 1874 li skribas: **„Eine Menge befremdlicher Erscheinungen in der bisherigen russischen Bewegung erklären sich daraus, daß lange Zeit jede russische Schrift dem Westen ein Buch mit sieben Siegeln war und daß es daher den Bakunin und Konsorten leicht wurde, ihr unter den Russen längst bekanntes Treiben dem Westen zu verbergen. Mit Eifer verbreiten sie die Behauptung, selbst die Schmutzseiten der russischen Bewegung müßten — im Interesse der Bewegung selbst — dem Westen verheimlicht werden; wer Russisches soweit es unange-**

nehmer Natur war, dem übrigen Europa mitteilte, der sei ein Verräter. Das hat jetzt aufgehört. Die Kenntnis der russischen Sprache ... ist wenigstens unter den deutschen Sozialdemokraten keine so große Seltenheit mehr. Die Russen werden sich in das unvermeidliche internationale Schicksal fügen müssen, daß ihre Bewegung fortan unter den Augen und der Kontrolle des übrigen Europas vor sich geht. Niemand hat die frühere Abgeschlossenheit so schwer zu büßen gehabt wie sie selbst. Ohne diese Abgeschlossenheit hätten sie nie jahrelang so schmählich beschwindelt werden können, wie dies von Bakunin und Konsorten geschah." (MESSÜ 564: Amaso da malagrablaj fenomenoj en la ĝisnuna rusa movado estas klarigebla per tio, ke ĉiu rusa verko en la okcidento estis dum longa tempo libro nebeĉifrebla (ein Buch mit sieben Siegeln) kaj tial estis facile al Bakunin kaj kompanio kaŝi al la okcidento sian agadon, kiu jam longe estis konata inter la rusoj. Kun fervoro ili disvastigis la aserton, ke eĉ la aĉaj flankoj de la rusa movado devus esti kaŝataj antaŭ la okcidento, en la intereso de la movado mem, kiu komunikis al la cetera Eŭropo iun ruslingvaĵon, se temis pri malagrablaĵo, tiu estis perfidulo. Tio nun ĉesis. La scipovo de la rusa lingvo ... almenaŭ inter la germanaj socialdemokratoj ne plu estas granda maloftaĵo. La rusoj devas akcepti la neeviteblan internacian sorton, ke ekde nun ilia movado evoluos sub la okuloj kaj kontrolo de la cetera Eŭropo. Neniu devis tiom peze penti la antaŭan izolitecon kiel ili mem. Sen tiu izoliteco ili ne povintus esti tiel fie trompitaj dum jaroj, kiel tio okazis flanke de Bakunin kaj kompanio).

4. Rezolucioj pri la universala lingvo

Fojfoje en la interlingvistika literaturo oni trovas indikojn pri tio, ke dum la kongresoj de la Internacia Laborista Asocio en Ĝenevo (1866) kaj en Lausanne (1887) estis akceptitaj rezolucioj pri universala lingvo. La ĉi-koncernajn literaturindikojn donas RATKAI (1978, 21 — 27), kiu ankaŭ tre kritike traktas la foje entuziasmajn interpretojn de tiuj faktoj.

La situacio, laŭ la bona superrigardo de RATKAI (kiu ankaŭ entenas la necesajn fontindikojn) estis jena:

En la tagorda propono kompilita de Marx por la Unua Kongreso de la Internacia Laborista Asocio en Ĝenevo 1866 (3. — 8. septembro) mankis iu ajn propono pri universala lingvo. Tiu problemo estis siatempe nek aktuala nek politike grava. Tamen dum la kongreso, kiun Marx ne ĉeestis, oni ankaŭ rezoluciis pri plej diversaj aferoj, ĉefe pro la influo de etburĝaj fortoj, kiuj volis fari diskutklubon el la kongreso kaj forrabis gravan tempon por pli esencaj taskoj (Fenomeno konate ankaŭ en modernaj Esperantaj asocioj kaj organizaĵoj). Pro tio lige al memuaro de M. Leneveux pri la simpligo de la ortografio de la franca lingvo, oni rezoluciis:

„La kongreso simpatias al tiuj societoj kaj al apartaj homoj, kiuj laboras je simpligo de l'franca ortografio por faciligi ĝian lernadon al tiuj homoj, kiuj ne posedas la tempon sufiĉan por lernado, kaj ĝi aprobas tiujn homojn, kiuj penas verki Universalan lingvon por firmigi la integradon de homoj de diversaj nacioj kaj fari ilin plej fruktodonaj por la feliĉo de la homoj."

Dum la kongreso en Lausanne (2. — 8. 9. 1867) denove prudonistoj sukcesis akceptigi rezolucion pri la sama temo, kvankam la plej aktualaj diskutendaj demandoj estis, kiel fari el la Internacio centron de la batalo por la liberigo de la proletaro kaj kiel decidi pri la demando de la laboristkredito.

Tamen la kongreso denove akceptis rezoluciojn nekoncernajn al la ĉeftemoj, i. a. ankaŭ jenan:

„La kongreso konsideras, ke universala lingvo kaj reformo de ortografio estus bona afero por ĉiuj kaj forte kontribuus al la unueco de la popoloj kaj al la frateco inter la nacioj."

Marx kompilis broŝuron kun la plej gravaj rezolucioj de la ĝeneva kaj brusela (8. — 13. 9. 1868) kongresoj. En tiu tiu broŝuro mankas la rezolucio pri la Universala lingvo, simple pro tio, ĉar la broŝuro devis enteni la plej gravajn rezoluciojn. Al tiuj la menciitaj

ne apartenas.
Ĉio ĉi tamen neniel signifas, ke Marx estis kontraŭ la reformo de la franca ortografio aŭ kontraŭ universala lingvo. La problemoj simple ne gravis dum la menciitaj kongresoj.

5. Proudhon pri la universala lingvo

En la Internacia Laborista Asocio Marx kaj Engels batalis por scienca socialismo kaj sekve kontraŭ la influo de etburĝoj, al kiuj apartenis la franca etburĝa socialisto Pierre Joseph Proudhon (1809 — 1865). Por kritiki lin, Marx trastudis la tutan verkon de Proudhon. Pro tio li ankaŭ konatiĝis kun ties verko „Essai de grammaire générale", kiu aperis 1837[9]). En letero al Schweitzer, ĉefredaktoro de la gazeto „Sozialdemokrat", Marx skribis 1865:
„Proudhons erster Versuche erinnere ich mich nicht mehr. Seine Schularbeit über die „Langue universelle" zeigt, wie ungeniert er sich an Probleme wagte, zu deren Lösung ihm noch die ersten Vorkenntnisse fehlten." (MESSÜ 348: Pri la unuaj provoj de Proudhon mi ne plu memoras. Lia lerneja verkaĵo pri la „Langue universelle" montras, kiel neĝenite li kuraĝas trakti problemojn, pri kies solvo al li mankis ankoraŭ la unuaj antaŭscioj).
Do tiu citaĵo tute ne entenas iun nuancan takson pri la problemo de la universala lingvo, sed ja estas interesa. Marx nome implicite postulas certan scinivelon, se oni traktas pri tiu problemo. Tiu lia juĝo, cetere, validus por multegaj aŭtoroj de planlingvaj projektoj, ĉe kiuj oni rapide trovas la naivecon kaj mankon de baza lingvistika scio. Kaj ties diletantismo estas unu el la kaŭzoj, ke lingvistoj sufiĉe skeptike rilatas al la planlingvo tute principe.

6. Engels pri Weitling

Wilhelm Christian WEITLING (1808 — 1871) utopia komunisto kaj aktivulo de la germana „Ligo de Justuloj" diversloke en siaj verkoj skribis pri la universala lingvo, i. a. en sia ĉefverko „Garantioj de la harmonio kaj libereco", aperinta en la jaro 1842[10]) li skribas:
„... sekve de la trafiko popolojn kunliganta jam ne eblas plua ekzisto de la lingvoj kaj landlimoj, kiuj malakcelas la disvastiĝon de la novaj ideoj kaj inventoj ... de post la invento de la fervojo fariĝis sentebla la rolo domaĝa kaj malakcela de la menciitaĵoj ... Jam la fervojo atentigas la homojn, ke necesas enkonduki mondlingvon, por ne mencii la perfektigo-perspektivojn de la aerŝipado ... La enkonduko de sola lingvo brule necesos por fari progreson de la sciencoj" (p. 99 — 100). En la tria eldono de la verko 1849, WEITLING jam uzas la terminon „universala lingvo".
WEITLING ankaŭ verkis eseon ⟨perdiĝintan⟩ kun la titolo „Allgemeine Denk- und Sprachlehre nebst Grundzügen einer Universalsprache der Menschheit" (Ĝenerala instruo pri la pensado kaj la lingvo kun bazaj trajtoj de universala lingvo). En sia verko li faris kelkajn proponojn pri simpla lingvo kaj i. a. opiniis, ke necesas forigi la dativon kiel „aristokratan inventaĵon"[11]).
En letero al Marx 1853 Engels faras rimarkon pri la projekto de WEITLING kaj skribas: **„Ich habe mir dabei drei Wochen als Maximum für das Persische angesetzt ... Für Weitling ist es ein Pech, daß er kein Persisch kann, er würde seine langue universelle toute trouvée haben, da es meines Wissens die einzige Sprache ist, wo kein Krakeel zwischen Mir und Mich entsteht, da der Dativ und der Akkusativ sich immer gleich sind."** (MESSÜ 572–573: Mi fiksis por mi kiel maksimumon tri semajnojn por la persa ... Estas malfeliĉo por Weitling, ke li ne konas la persan, li estus tute trovinta sian langue universelle, ĉar ĝi laŭ mia scio estas la sola lingvo, kie ne ekestas kverelo inter al mi (mir) kaj min (mich), ĉar la dativo kaj akuzativo estas ĉiam samaj).

7. Marx kaj Engels pri lingvo-planado

Ĉio ĉi ĝis nun prezentita estas ja interesa sed ne influis la lingvosciencan koncepton pri la universala aŭ internacia lingvo, pri planlingvo. Tamen, almenaŭ por marksistaj lingvistoj unu

citaĵo de Marx kaj Engels el ilia komuna verko „Die deutsche Ideologie" (La germana ideologio) estas fundamente grava por ĝuste taksi la fenomenon de planlingvo. Ĝi fojfoje estas citata rilate al lingvoplanado. Oni diras, ke la tekstoparto estas de Marx. Mi ne trovis la pruvon por tio. Pro tio mi skribos pri „ili" do pri Marx kaj Engels. Ili skribas: **„Die Naturwüchsigkeit der Sprache ist übrigens in jeder modernen ausgebildeten Sprache, teils durch die Geschichte der Sprachenentwicklung aus vorgefundenem Material, wie bei den romanischen und germanischen Sprachen, teils durch die Kreuzung und Mischung von Nationen, wie im Englischen, teils auf ökonomischer und politischer Konzentration bestehende Konzentration der Dialekte innerhalb einer Nation zur Nationalsprache aufgehoben. Daß die Individuen ihrerzeit auch dies Produkt der Gattung vollständig unter ihre Kontrolle nehmen werden, versteht sich von selbst."** (MESSÜ 237)

En tiu citaĵo aparte gravas la lasta frazo. Marx kaj Engels antaŭvidas, ke (1) iutempe la homoj (2) prenos sub sian kontrolon la lingvon, kaj tio estas por ili (3) tute memkompreneble. Do, la homo ne nur konscie kontrolas (kaj sekve ŝanĝas) la materian kaj socian mondon sed ankaŭ sian instrumenton, la lingvon, kiu ĝenerale estis rigardita longtempe kiel ne ŝanĝebla dia kreaĵo. Pri la konscia influo de la homo je la evoluo de la lingvo ni jam abunde skribis aliloke[12]) kaj montris, ke kompreneble ekzistas multaj pruvoj por tio, ke la homoj konscie kontrolos (kaj ŝanĝos, se necese) sian instrumenton lingvo. Kiel do, la homo ankaŭ ne povus eĉ krei lingvon?

La citita teksto pro sia graveco estas plurfoje tradukita esperanten, bedaŭrinde ne ĉiam laŭ la germana originalo sed laŭ malsamaj fontoj. Tiel okazis, ke ekzistas gravaj diverĝoj inter la tradukoj, kiujn resumis LEVSEN 1983[13]) laŭ instigo de KEABLE. Ne detaligante la problemon sed atentigante pri la materialo en la GDR-Paco 1983, ni recitas nian tradukon el la jaro 1971 kun kelkaj korektoj kaj kun komento. Do la traduko:

„La natura kreskinteco de lingvo cetere estas nuligita kaj konservita en ĉiu alia plenevoluinta lingvo, parte pro la historio de la lingva evoluo el ekzistinta materialo kiel ĉe la romanaj kaj ĝermanaj lingvoj, parte pro la interkruciĝo kaj intermiksiĝo de nacioj kiel ĉe la angla; parte pro koncentriĝo de la dialektoj interne de nacio al nacia lingvo, baziĝanta je ekonomia kaj politika koncentriĝo. Ke la individuoj siatempe prenos ankaŭ tiun produkton de la specio sub sian regon, kompreniĝas el si mem." Tiu traduko povus esti mia respondo al la menciita alvoko de KEABLE kaj LEVSEN. La malfaciloj aparte kuŝas en la signifoj de du esprimoj: „aufgehoben" kaj „unter ihre Kontrolle nehmen".

a) Marx kaj Engels verŝajne komprenas „aufheben", kiel ofte, ankaŭ ĉifoje en dialektika senco. Do oni devus traduki la esprimon samtempe per „nuligita" kaj „konservita".

b) Kiel KEABLE ĝuste atentigas, „kontroli" en Esperanto ne enhavas la anglan kaj (ankaŭ) germanan signifon de „regi" (kontroli bankon, entreprenon, akcian societon). Per aparta rimarko PIV (561) atentigas „kontroli neniam havas la anglan sencon: regi, direkti". Sciante, ke la esenca trajto de la instruo de Marx kaj Engels estas **aktive ŝanĝi** la sociajn kondiĉojn, oni povas tamen supozi, ke ankaŭ rilate la lingvon ili komprenis „kontroli" en tiu aktiva senco. Por stimuli diskuton pri tiu grava problemo mi ankaŭ citas la aliajn tradukojn kaj la komparon: En sia „Historio de la Mondolingvo" (Leipzig 1931, p. 7) DREZEN tradukis: „En ĉiu nuntempa alt-evoluinta lingvo la pratempe elemente naskiĝinta parolo leviĝas al la nivelo de nacia lingvo. — parte dank' al historio de la lingvoevoiuo — el la jam preta materialo, kiel ni tion observas ĉe la romanaj kaj germanaj popoloj, parte dank' al intermiksiĝo de la popoloj, kiel ĉe la angla lingvo, parte dank' al koncentriĝo de dialektoj ĉe iu popolo, kio eventas sur bazo de ekonomia kaj politika koncentriĝo. Estas memkompreneble, ke la in-

dividuoj siatempe kapablos plengrade kontroli tiun ĉi produktaĵon de la homgenro."

Eble li eliris de la rusa traduko. Alia traduko estas de SKUPAS („Horizonto de Soveta Litovio", 2/1971, p. 7, en la artikolo „Lingvistikaj konceptoj de F. Engels):

„Natura lingva kreskado, cetere en ĉiu moderna evoluinta lingvo, leviĝis al nacia lingvo parte per historia evoluo de lingvo el antaŭe trovita materialo, kiel tio okazis ĉe romanaj kaj germanaj lingvoj; parte per kruciĝo kaj miksiĝo de nacioj, kiel ĉe la angla; parte per koncentriĝo de dialektoj interne de unu nacio surbaze de ekonomia kaj politika koncentriĝo. Ke la individuoj siatempe ankaŭ tiun ĉi faritaĵon de la homa gento prenos sub sia absoluta kontrolo, estas memkompreneble."

SKUPAS estas Litovo. Laŭ kiu traduko li esperantigis?

8. Konklude

Marx kaj Engels ne aparte aŭ sisteme okupiĝis pri la lingva komunikada problemo nek pri la universala lingvo. Ili estis poliglotoj kaj kapablis transsalti la lingvajn barojn. Tamen iliaj eldiroj pri lingvaj demandoj estas valoraj por la ĝenerala interlingvistika problemaro. La periferiaj mencioj de la universala lingvo ne ebligas konkludi pri negativa aŭ pozitiva sinteno al la problemo. Ĝi simple por ambaŭ ankoraŭ ne estis aparte grava kaj priparolinda problemo. Aliflanke forestas iu ajn negativa nuanco. Pleje gravas, apliki la teorion de la marksismo-leninismo je la problemo de internacia lingva komunikado ĝenerale — kun ĉiuj aspektoj — kaj je la planlingvoj aparte.

9. Notoj

1) Kp. Rátkai, A. (1978): Socialismaj teorioj kaj la internacia laborista asocio pri la universala lingvo. En: Blanke, D. (1978, Red.): Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado. Budapest (HEA), p. 13 — 30.

2) Kp. Drezen, E. (1931): Historio de la mondolingvo, Leipzig (EKRELO), 28 — 32, 44 — 45, 51, 53, 54

3) COUTOURAT, L./LEAU, L. (1903): Histoire de la langue universelle. Paris, (2-a eldono 1907), represo komune kun 5) ĉe Olms-Verlag, Hildesheim 1979 (kun aldono de R. Haupenthal)

4) BAUSANI, A. (1970): Geheim- und Universalsprachen. Entwicklung und Typologie. Stuttgart.

5) COUTOURAT, L./LEAU, L. (1907): Les nouvelles langues internationales. Paris

6) RUSCHINSKI, H./RETZLAFF-KRESSE, B. (1974, Red.): Karl Marx, Friedrich Engels. Über Sprache, Stil und Übersetzung. Berlin (Dietz)
kaj ekzistas indekso al la verko:
STEFFENS, D./WOLF, B. (1977): Sachregister zu dem Sammelband Karl Marx und Friedrich Engels. Über Sprache, Stil und Übersetzung (Berlin 1974). Sprachwissenschaftliche Informationen, 2/77, Sonderheft, Akademie der Wissenschafter der DDR, Zentralinstitut für Sprachwis senschaft, Berlin

7) DULIČENKO, A. (1982): Interlingvistika minevikust ja tänapäevast- En: Keel ja kirjandus, Tallinn, XXV, n-ro 6, p. 288 — 294

8) Ni mallangigas la sub 6) cititan verkon laŭ la komencaj literoj de la titoloj: MESSÜ (**M**arx, **E**ngels über **S**prache, **S**til und **U**bersetzung)

9) PROUDHON, P. J. (1837): Essai de grammaire générale. En: Nicolas-Sylvestre BERGIER: Les éléments primitifs des langues. Besançon

10) Represo de la verko: WEITLING, W. (1955): Garantien der Harmonie und Freiheit. Berlin (Akademie-Verlag) 1955

11) Kp. MARX-ENGELS-Werke, vol. 28, Berlin (Dietz) 1963, p. 696

12) BLANKE, D. (1981): Pri la problemo de laŭplana influado je la lingvoevoluo fare de la homo. En: GDR-eldono de „Paco", Berlin 1981, p. 24 — 31.
La studo aperis en pola traduko en EJSMONT, T. (1982, Red.): Problemy miedzynarodowej komunikacji jezykoweij. Problemoj de internacia lingva komunikado. Materialy konferencyjne. Lodz (Uniwersytet Lodzki) 1982, p. 180 — 207.

13) LEVSEN, P. (1983): Grava teksto de Karl Marx en diversaj tradukoj. En: GDR-eldono de „Paco", Berlin, 1983, p. 20 - 21.

Detlev Blanke

resto de p. 136

instruistoj el la lernejoj kaj pedagogiaj institutoj. Ili nelonge lernis la Lingvon Internacian kaj jam komencis ĝin instrui. La ĉeeston de 80 Esperanto-instruistoj pripagis la ukrainiaj sindikatoj. La gastamaj mastroj — la profesiaj ĉiĉeronoj kaj tiuj el la Poltava Esperanto-klubo gvidis nin tra la famaj lokoj de la urbo kaj montris al ni la historiajn batalkampojn ekde la tempo de Petro la Granda kaj multajn aliajn vidindaĵojn. Kaj dum la vespera tempo la geesperantistoj el Poltavo kaj Slavjansko plezurigis nin per sia arto kanti, muziki, gajigi. Dankon al ili.

N. Starodubcev

Erika Piatkowiak

Kelkaj spertoj kun Esperanto-kursoj en Popola Vespera Lernejo

Ĝis nun mi nur gvidis kvin kursojn en la Popola Vespera Lernejo de Freiberg. Pro tio miaj spertoj sur tiu kampo ne estas tre grandaj. Sed mi esperas, ke kelkaj aspektoj povus interesi ankaŭ aliajn kursgvidantojn.

Granda avantaĝo por la instruado en la dekklasaj ĝeneralklerigaj politeknikaj superaj lernejoj (6 — 16-jaruloj) estas la sama aĝo, klereco kaj lingvaj antaŭkonoj ĉe ĉiuj lernantoj en unu klaso. Diferencoj nature ekzistas koncerne la lernkapablon kaj rapidon de la lernproceso. Malavantaĝo povus esti la sento ĉe multaj lernantoj, ke ili **devas** lerni. Tiuj lernantoj ofte formas la ĝenantajn faktorojn en la klasoj, sed tio estas natura fenomeno.

La situacio en la popolaj altlernejoj estas tute alia. Mi havis en la kursoj ekstremojn laŭ la klereco, aĝo kaj antaŭkonoj. Unu kurson ekzemple partoprenis kvindek kvin jara laboristo, kiu ĝis nun neniam lernis aliajn fremdajn lingvojn, kaj aliflanke partoprenis juna diplomita inĝeniero, kiu antaŭe studis en Sovetunio. Alian kurson partoprenis doktoro de medicino, sesdek du jaraĝa kun bonaj konoj de la angla, latina kaj franca lingvoj. Li sidis apud du dek-kvar-jaraj lernantinoj el la oka klaso.

Ekstremoj de la aĝo en unu kurso: dek-du-jara lernantino el la 6a klaso kaj sepdek du jara pensiulino. Tiuj grandaj diversecoj nature reprezentas malavantaĝon. Ni nur havas unu avantaĝon en niaj kursoj: la tute libervolan partoprenon je la kursoj. Sed ĝi samtempe estas por kursgvidantoj tasko ne seniluziigi la lernantojn. Nia celo pro tio estu, doni al ĉiuj — ne nur al du aŭ tri — partoprenantoj la senton de la kontentigo kaj sukcesa travivaĵo en ĉiu instruhoro. Sed kiel ni povas proksimiĝi al tiu celo?

Per diferencita instruado. Premiso por tiu bone konata kaj malnova instruvojo estas la ekzakta kono de la lingvaj antaŭkonoj de ĉiuj lernantoj kaj la proksimuma kono de ilia klereco. Nature en malgrandaj kursoj de dek ĝis dek kvin personoj ni povas plenumi tiun premison pli bone ol en kursoj kun tridek lernantoj. Nur se ni konas niajn lernantojn, diferencita kaj celita instruado havas bonan fundamenton.[1])

Ekzistas multaj ekzemploj, kiel ni povas alparoli kaj stimuli niajn lernantojn. Mi volas mencii kvar:

1. Se mi klarigas novajn vortojn, mi demandas kaj lasas klarigi vortojn „kolbaso", „tramo" aŭ „trajno" flanke de lernantoj el la oka aŭ naŭa klaso, kiuj lernas la rusan kaj la anglan lingvojn. Estas ĝojo por ili, ekkoni kaj kompari tiujn vortojn. La vortojn „ĉambro" aŭ „vivi" klarigas lernanto kun konoj de la franca kaj la latina lingvoj.
2. Grandan helpon por mia instruado nature donas al mi nia lernolibro, ekzemple dialogoj. Ĉiuj lernantoj preparas la samajn dialogojn diferencite. Bonaj lernantoj ludas la dialogon antaŭ la klaso parkere, aliaj nur enmetas la vortojn kaj legas ĝin laŭte.
3. „Rerakontu la tekston" inkluzivas la eblecon prezenti ĝin kun malmultaj facilaj vortoj aŭ riĉigitaj je malfacilaj parolturnoj. Se mi iras dum la minutoj de la preparado de unu al alia, mi donas celitan helpon kaj impulsojn.
4. Certe ankaŭ vi posedas kelkkajn ekzemplerojn de „Juna amiko". Mi donas ilin al interesitaj lernantoj kaj petas ilin raporti pri difinita artikolo dum la venonta instruhoro.

Resumo

Sur la fundamento de la libervola partopreno de la lernantoj en E-kursoj de popolaj vesperaj lernejoj kaj bona kono de la lernantoj flanke de la instruisto ni povas transporti per diferencita instruado la malavantaĝon de la granda diferenco laŭ aĝo, klereco kaj lingvaj antaŭkonoj ĉe niaj lernantoj. Ni instruistoj klopodu doni al ili la senton de kontentigo kaj sukcesa travivaĵo en ĉiu instruhoro.

[1]) Kp. la ĉi-rilate gravan kontribuon de Pančev en „Esperanto" 3/1982, p. 49

Ĉu estas germanaj vortoj en Esperanto?

Bernard Golden

En antaŭa artikolo, „Pri la esploro de la germana komponanto“ (**der esperantist,** 6/1982, n-ro 116, p-oj 131-132), mi listigis bibliografiajn referencojn pri jam publikigitaj studaĵoj koncernantaj la temon de germanaj leksikaj elementoj en Esperanto. Estas evidente, ke trastudado de la cititaj verkoj estas la unua paŝo por ĉiu plua reserĉo sur tiu ĉi tereno[1]). La dua paŝo estas la starigo de metodologio por gvidi la laboron. Estas necese difini principojn por kolekti donitaĵojn kaj interpreti ilin. En tiu ĉi artikolo mi deziras ekzameni kaj pritaksi metodojn, kiujn Manfred Arnold ellaboris en sia studaĵo, kies rezultoj estis publikigitaj en la artikolo titolita „Ĉu germana aŭ angla?“ (**der esperantist,** 1/1982, n-ro 111, p-oj 9-12).

La unua demando koncernas terminologion. La subtitolo de la verko de Arnold tekstas: „Pri germanaj vortoj en Esperanto.“ Tiel esprimita ĝi estas misgvida, ĉar, efektive, ne estas unu sola **germana** vorto en Esperanto. Ĉiuj vortoj en la Esperanta leksiko estas **Esperantaj** vortoj. La plejmulto el ili ja devenis de diversaj etnolingvoj, sed por esti uzeblaj en la Internacia Lingvo, ili ne plu povis konservi sian etnolingvan formon aŭ signifon. Preskaŭ ĉiuj devis ricevi Esperantan gramatikan finaĵon. La germana vorto **Bild** fariĝas la Esperanta vorto „bild/o“, kies radiko povas ricevi ankoraŭ aliajn Esperantajn gramatikajn finaĵojn, ekzemple "bild/a“ kaj „bild/ig/i“. Aliaj germanaj vortoj esperantiĝas nur post fonetikaj kaj ortografiaj modifoj. Por ke la sono de la „w“ en G. **Wand** estu konservita, la litero „v“ devas anstataŭi ĝin en Eo. „vand/o“. En aliaj kazoj la germana vorto estas mallongigita. La fina „e“ en G. **Klinge** estas ellasita en Eo. „kling/o“, kaj G. **Schinken** perdas sian lastan silabon por doni Eo. „ŝink/o“. Eĉ la ŝajnoj esceptoj, adverboj sen gramatika finaĵo kiel „nun“, „nur“ kaj la neologismo „erst“, kies formoj en Esperanto identas kun la germanaj ekvivalentoj, jam ne estas germanaj, ĉar en Esperanta kunteksto ili estas tute asimilitaj, hejmigitaj.

Oni, do, ne parolu pri germanaj vortoj en Esperanto, sed pri vortoj **de germana deveno**. La ĉi-supre cititaj germanaj vortoj estas la etimoj de la respondaj Esperantaj vortoj. La celo de la esploro de Manfred Arnold estis trovi ĉiujn vortojn en Esperanto, kiuj havas germanajn etimojn, por povi pritaksi la proporcion kaj gravecon de la germana komponanto de la leksiko de Esperanto la analizo de la Esperanta leksiko por tiu celo alfrontas malfacilaĵon, ĉar oni devas okupiĝi ankaŭ pri ĝermanaj elementoj en Esperanto, t.e. vortoj devenantaj de aliaj lingvoj de la ĝermana branĉo, kelkaj el kiuj ne nur estas parencaj, sed ankaŭ tre similaj al germanaj vortoj. La ĉefaj ĝermanaj lingvoj, kiuj devas esti konsideritaj en etimologiaj esploroj estas la germana, la jida kaj la angla. Zamenhof certe estis denaska parolanto de la jida, kaj li ĝisfunde lernis la germanan lingvon, povante uzi ĝin skribe kaj buŝe. Lia scio de la angla lingvo estis elementa kaj pasiva; li verŝajne kapablis legi simplajn tekstojn sed povis nek skribi ĝin nek traduki literaturajn verkojn. Tio ĉi validas por la parto de la Esperanta leksiko, kiu venis el la plumo de la aŭtoro de la lingvo. Poste, oni devas atenti ankaŭ pri Esperantaj vortoj, kies etimoj troviĝas en aliaj ĝermanaj lingvoj kiel la skandinaviaj kaj la nederlanda. Zorga analizo ankaŭ de la zamenhofa leksiko eble malkovros vortojn havantajn etimojn en tiuj lingvoj; ekzemple, „sundo“ certe devenas de la dana **Sund.**

Starigante principojn por decidi, ĉu certa Esperanta vorto venas de la germana lingvo, estas necese samtempe determini la limojn de la etimologia analizo. Etimologiaj vortaroj ofte spuras la originon de pruntvortoj nur ĝis la etimo, de kiu ĝi eniris la koncernan lingvon. Tiu gvidlinio estas aplikinda ankaŭ al etimologiaj esploroj de la Esperanta leksiko. Sciante la etnolingvan etimon, oni facile povas sekvi la historion en konsultlibroj dediĉitaj al

unuopa lingvo aŭ lingvobranĉo. Tiu principo ne estis adoptita de Arnold en sia esploro. Li senutile kaj pedante balastigis sian studaĵon per listo de malnovgermanaj kaj anglosaksaj vortoj, kiuj tute ne rolis en la formado de la leksiko de Esperanto. La sekva ekzemplo ilustros tion. Arnold ne kuraĝas decidi pri la etimo de kelkaj Esperantaj vortoj „kies germanaj kaj anglaj konformajoj estas tiom similaj ...", kaj li prezentas kiel pruvon de la historia kaŭzo de tiu simileco kvinkolumnan komparan tabelon. Por montri, ke tiu metodo kondukas al sakostrato, ni ekzamenu unu el la listigitaj vortoj, „ŝultro". La parencaj vortoj en la germana kaj angla estas **Schulter** kaj **shoulder** respektive. Laŭ Arnold la malnovgermana formo estas **scultarra** kaj en la anglosaksa lingvo **sculdor**. Oni povas aldoni, ke la mezepok-angla vorto estas **sholder,** la oldfrisa **sculdere,** kaj variaĵoj de la oldalt-germana vorto estas **sculter(r)a** kaj **scultra**. Pli profunda analizo montras, ke „ŝultro" estas parenca al la vorto „ŝelo"! Tamen, tiu detala etimologia spurado tute ne ĵetas lumon sur la problemon de la etimo de „ŝultro" en Esperanto, ĉar Zamenhof mem ne uzis komparlingvistikan metodologion por serĉi prototipojn. Li tutsimple prenis vortojn el la lingvoj kiujn li sciis, do oni devis elekti inter A. **shoulder** kaj G. **Schulter**. La angla vorto estas eliminebla, ĉar la vokaloj „ou" estas prononcataj kiel „o" kaj la antaŭlasta konsonanto estas „d". Male, en la germana vorto, la vokalo estas „u" kaj la konsonanto „t" same kiel en la Esperanta vorto. En tiu ĉi kazo la hezito de Arnold ne estas komprenebla. Por esperantigi **Schulter** estas necesa nur fonetika transskribo de „sch" kaj ellaso de la „e" en la lasta silabo. Pli drasta ortografia transformo estas bezonata, por ke **shoulder** farigu „ŝultro".

En mia ĉi-supre citita artikolo, mi montris, ke unu el la gravaj difektoj de la esploro de Arnold, estis lia preteratento de la jida lingvo. Nun mi deziras reliefigi ankoraŭ unu neglektitan aspekton de lia etimologia analizo de Esperanto. Temas pri la rolo de du slavaj lingvoj, kiujn Zamenhof sciis, la rusa kaj la pola, kiuj estis fontoj de germandevenaj vortoj. La problemo prezentiĝas jene: kiel estas eble decidi, ĉu la etimo de germandevena Esperanta vorto estas la germana vorto mem aŭ la responda pruntvorto en la rusa aŭ pola lingvo? Ĉu la etimo de „ŝnuro" estas G. **Schnur**, rusa **ŝnur,** aŭ pola **sznur**? La prononco de la tri etnolingvaj vortoj estas identa. En **Universala Vortaro** troviĝas tradukoj de la Esperantaj vortoj en kvin lingvojn. Le germana ne estas **Schnur** sed **Strick,** kaj la rusa ekvivalento estas **verevka,** ne **ŝnur**! Surprize, ŝnuro" estas tradukita per la pola vorto **sznur.** Ĉu tio signifas, ke Zamenhof pensis unue pri la pola vorto kaj uzis ĝin kiel etimon por formi „ŝnur/o" en sia lingvo? Kaj oni ne forgesu, ke ankaŭ la jida vorto estas **ŝnur.**

En sekvaj artikoloj mi detale analizos aliajn etimologiajn problemojn por montri, ke la grupigo de vortoj en la studaĵo de Arnold devas esti draste reviziita.

[1]) La verkoj, kiujn mi citis, estis publikigitaj dise en periodaĵoj kaj libroj, kiuj nuntempe estas malfacile akireblaj. Tre utila esperantologia projekto por la Esperanto-Asocio de Kulturligo de GDR estus la kolekto kaj represo de tiuj kaj aliaj samtemaj studaĵoj en unu volumo.

fino de p. 139:

En la leciono IV,A-1 (pp. 47/48) estas prezentataj la t. n. kunmetitaj tempoj; mi subtenas la aŭtoron, jam en lernolibro por komencantoj enkonduki tiujn ĉi formojn, sed ĉu la sekva frazo korespondas kun la esprimendo:

„Kiam mi estos studonta tion, neniu povus interrompi mian studadon."

(Laŭ la konteksto, la aŭtoro volas esprimi, ke dum la estonta studado neniu — verŝajne — interrompi lian okupiĝon pri — nature — Esperanto. Sed la formo „mi estos studonta" priskribas fazon a n t a ŭ la komenco de la planita studado, pro tio oni ne povas paroli pri ebla interrompo de la studado.)

En la sama teksto la aŭtoro foje preferas la kondicionalon, foje la indikativon, kvankam la propozicioj ne estas diversnivelaj „Ĉu tiuj telefonantaj personoj **kredus**, ke ili filiĉigas ... min ...?"

„Ĉu ili ne **aŭdas, ke mi ofte koleriĝas ...?**"

Mi rekomendas, ke en la uzado de la kondicionalo oni aŭ limiĝu al unu varianto aŭ donu kromajn klarigojn.

La skizita lernolibro „Esperanto snel assimileren" estas vera pliriĉigo por metodikistoj de fremdlingvo-instruado kaj instigas la kreivecon de la lernantoj kaj ankaŭ de kursgvidantoj.

d-ro Till Dahlenburg

Esperantista palaco en Bulgario

En la meza parto de la bela montaro Rodopoj en Bulgario, inter la domoj dissemitaj sur la krutaj altaĵoj, en Pisanica, apud la urbo Smoljan, troviĝas neĝblanka konstruaĵo de rava alpeca aspekto. Super ĝi staras granda verda lumstelo kaj sur la fronta fasado de malproksime vidiĝas la lumŝildo „Internacia Esperanto-Kursejo". Tiu valora akirajo por la bulgara kaj eksterlanda esperantistaro estas unika en la mondo — vera Esperanto-palaco en la montaro de la legenda traca muzikisto Orfeo.

La ideo pri la konstruado de la Esperanto-domo en Rodopoj ŝajnis nerealigebla fantaziaĵo, ĉar estis vere fantaziulo tiu, kiu generis la unuan projekton — la malnova Esperanto-aktivulo Jordan Jordanov. Grandega estis lia lukto kontraŭ antaŭjuĝoj kaj aliaj obstakloj, kiujn li renkontadis survoje al la realigo de la ideo. Estis momentoj, kiam li devis oferi eĉ siajn proprajn monrimedojn por antaŭpuŝi la konstruadon, kiu daŭris de 1976 ĝis 1979. Necesis transporti multajn milojn da brikoj kaj tunojn da alispeca konstrumaterialo. Oni senĉese devis klopodi ĉe la registaraj kaj distriktaj financaj instancoj por ĉiu bezonata levo (bulgara monunuo). La elspezoj estis grandegaj: pli of 1,4 milionoj da levoj (pli ol 4 milionoj da guldenoj, laŭ la nuna oficiala kurzo).

Neimagebla estis la fakto, ke Jordanov, kiel gvidanto de la konstrulaboroj (li estis samtempe direktoro de Internacia Esperanto-Kursejo kaj prezidanto de la distrikta estraro de Bulgara Esperantista Asocio en la urbo Smoljan), dum la tuta tago laboris kiel konstrulaboristo, sen aldona pago. Vespere, eĉ ĝis noktomezo, Jordanov laboris en la oficejo por prizorgi la administrajn aferojn. Li uzis por la laboroj ĉiun dimanĉon kaj ne forestis eĉ por siaj jaraj feriotagoj.

Tamen, Jordan Jordanov ne estis sola en lç granda laboro. Li estis subtenata, fervore kaj sindone, de preskaŭ 800 geesperantistoj el 16 Esperanto-societoj el la distrikto de Smoljan (15 el tiuj E-societoj estis fonditaj sub la gvido de J. Jordanov). Ili dediĉis pli ol mil libervolajn labortagojn al la konstrulaboroj de la Kursejo en Pisanica. Subtenis lin ankaŭ la gvidantoj de la bulgara Esperanto-movado, ŝtataj aŭtoritatoj kaj instancoj. Tiun subtenon ebligis interalie la fakto, ke multaj eminentaj funkciuloj en Bulgario mem estas esperantistoj kaj arde simpatias la agadon de la bulgara Esperanto-movado.

Kiam oni eniras la Kursejon en Pisanica, tiun veran Esperanto-palacon, frapas je unua rigardo la moderna kaj luksa aranĝo de ĉiuj ejoj kaj anguletoj: helaj klasĉambroj kun bonaj lernokondiĉoj, aŭdvida kabineto kun moderna ekipaĵo por 20 personoj, en ĉiu etaĝo elegantaj salonetoj kun televidilo, 60 dormoĉambroj (du-, tri-, 6- kaj 8-litaj, kun tualetejo kaj duŝo), 4 komfortaj apartamentoj kun ĉiuj oportunajoj.

La domo funkcias tra la tuta jaro kaj havas kapaciton por samtempe loĝigi 200 personojn.



La vasta manĝejo proponas bongustajojn de la bulgara kuirarto. Ĉiun labortagon antaŭtagmeze okazas po 4 horoj da lernado de Esperanto. Posttagmeze oni faras interesajn ekskursojn: al Planedario en Smoljan, ripozloko Pamporovo (kie oni per dratfervojo atingas la montopinton Sneĵanka, 2200 m super la marnivelo, kaj ĝuas admirindan panoramon), subtera rivero kaj la groto „Diabla Gorĝo" apud Trigrad, la vilaĝo Mogilica kun antikva laborejo. Foje okazas piedekskursoj al la pitoreska ĉirkaŭaĵo de la Esperanto-domo, sportaj ludoj, amuzaj vesperoj en bone ekipita diskoteko, projekciado de lumbildoj kaj filmoj, prelegoj pri la Esperanto-movado kaj pri Bulgario.

La partoprenkotizoj inkluzivas 14-tagan restadon (tranoktado, manĝoj trifoje tage, lernado de Esperanto, kultura kaj turisma programo). Kiam kursano loĝas en dulita ĉambro, li aŭ ŝi pagas 196 levojn (ĉ. 570 gld), en trilita 168 kaj en 6- ĝis 8-lita ĉambro 140 levojn.

La konstruaĵo de la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica situas 1025 metrojn super la marnivelo. En la proksimeco troviĝas diversaj sportejoj. La Kursejo disponas ankaŭ pri ĉiuj necesaj laborkondiĉoj por konferencoj, kunsidoj kaj aliaj Esperanto-aranĝoj, landaj aŭ internaciaj. Pro la monta karaktero de la tereno kaj la forta influo de Mediteraneo, la klimato distingiĝas per milda vintro kaj freŝa somero.

Kun siaj ĉiam verdaj pinarboj, vastaj herbejoj, originala arkitekturo, komfortaj loĝeblecoj, vizitinda ĉirkaŭaĵo, riĉa kaj varia restadprogramo, kun la ebleco perfektigi sian konon de la Internacia lingvo, la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica estas io unika kaj tial spertinda. Skribu al nia koresponda adreso: Internacia Esperanto-Kursejo, pk. 791, BG—1090 Sofia, Bulgario. Informojn ankaŭ donas GDREA.

Marija V.Diĉeva
(Lau „Esperanto" 11/82) mallongigita)

TRADUK-KONKURSO TASKO 6.

Das Licht auf dem Galgen

Antoine verließ das Café, in dem er oft nachmittags etwas trank, bevor er zu seinen Schülern ging. Er wurde sofort in der Straße aufgehalten. „Sind Sie der Bürger Antoine?"

Er setzte seinen Weg fort, als hätte er nichts verstanden. Der Fremde packte ihn am Arm. „Sind Sie's oder nicht?" Antoine sagte scharf: „Lassen Sie mich in Ruhe! Was wollen Sie denn?" Er hatte in den vergangenen Jahren gründlich gelernt, wenn auch noch längst nicht ausgelernt, auf der Hut zu sein vor Narren und Dummköpfen, vor Spitzeln und Provokateuren. Der Fremde ließ seinen Arm los; er lief ein paar Schritte neben ihm her. „Der Brief da ist sicher für Sie." Sein Gesicht war breit, gesund, gleichmütig, sein Blick gewohnheistgemäß genau. Antoine, an die Einschätzung von Gesichtern gewöhnt, nahm an: ein Seemannsgesicht. Es gab keinen Grund, abzustreiten oder zuzugeben, daß er der Gesuchte sei. Dann sah er eine Art Vorwurf in den grauen und ruhigen Augen, Bedauern oder Vorwurf. Er nahm den Brief in die Hand.

Er rief: „Der ist schon alt!" — „Mehr als zwei Jahre", sagte der fremde Mann, „mein Freund hat Ihnen selbst sagen wollen, was drin steht. Wir trafen uns unterwegs in einem Lazarett in Kuba. Dort hat auch mein Freund den Tod ausgebrütet. Er hat zuletzt von nichts anderem geredet als von dem Brief. Man hat mich zwar bis auf die Knochen ausgeräuchert; den Brief hat man aber nicht erwischt.

Mein Schiff fuhr nach Florida, da hat uns der Spanier einen Strich durch die Rechnung gemacht und uns festgehalten in Kuba. Als ich endlich loskam und zurück nach Martinique wollte, hat mir der Engländer einen Strich durch die Rechnung gemacht. Er fing mich, und er schleppte mich bis Trinidad, und er ließ mich erst dieses Frühjahr weg, als der Konsul Bonaparte einen Frieden mit ihm gemacht hat.

Dann fuhr ich nach Martinique. Und von dort nach Boulogne."

„Ja aber", sagte Antoine und drehte den Brief in der Hand, „wie haben Sie mich denn hier gefunden?"

Er dachte: Ein Fehler, ihn wissen zu lassen, wer ich bin. Es abzustreiten — genauso falsch.

Das Gefühl, auf unsicherem Boden zu stehen, war ihm vertraut. Er hatte wieder ein Gefühl von Gnadenfrist. Die gelben Äpfel des Straßenmarktes, vor dem sie jetzt standen, hatten in der dunstigen Luft den Schimmer flüchtiger Lichter. All die Gerüche, die er auf einmal spürte, beinah berauschend, würde es nie mehr in seinem Leben geben.

(Aus Anna Seghers: Karibische Geschichten)

[Pri kondiĉoj vidu „der esperantist" 120]

Pri „bedaŭri"

Oni sentas, ke la aŭtoro de tiu artikolo ⟨der esperantist 118⟩ ne ŝatas la vorton pro ĝia germana karaktero. Ĉu regreti aŭ deplori estus pli bonaj? La vorto regreti estus unu el pli ol 30 verboj kun ‚re' (recenzi recepi, registri, regresi k. t. p.). Tio ne estas bona, ĉar ‚re' oni uzu kiel prefikso. Tial Zamenhof anstataŭis kelkajn re per ri (rigardi, rikolti k. t. p.)! Kial ne ĉiujn? Kial ne ‚rigreti', Regreti estus unu re-vorto pli. Ekzistas la konfuzo kun regresi k. t. p., pli bona estus ‚deplori', sed al mi ne plaĉas, ke oni pensas pri plori ĉi tie.

Cetere la listo de vortoj en latinidaj lingvoj ne estas kompleta. Mankas: rumana — a regretta, itala — deplorare.

‚Bedaŭri' kun la malofta silabo ‚be . .' ŝajnas al mi tre bone elektita de Zamenhof. Neniam oni intermiksas ĝin kun similaj vortoj. Estas tre multaj vortoj en E, kiujn oni povus kritiki, sed ‚bedaŭri' tute ne estas kritikinda.

Mi ŝatus, se ‚der esperantist' pli ofte aperigus artikolojn pri lingvaj problemoj.

Werner Haupt
9063 Karl-Marx-Stadt, Breitenlehn 24

Vortaro profesinivela

Erich-Dieter Krause: Wörterbuch Deutsch-Esperanto, VEB Verlag Enzyklopädie Leipzig 1983, 596 p., 120 x 190 mm

1. La evoluo de la lingvo mem kaj de ties praktika apliko — dialektike kunligita procezo — necesigas la kreon de ĉiam pli altkvalitaj leksikografiaj verkoj. Ne estas kutimo en la Esperanto-movado, kun kelkaj esceptoj, ke tion faras profesiuloj, kio facile estas videbla en multaj vortaroj. La recenzatan vortaron faris profesia lingvisto kaj leksikografo, kiu laboras en la universitato de Leipzig. D-ro Krause estas specialisto por la indonezia lingvo, ankaŭ studis la ĉinan kaj konas krome kelkajn aliajn lingvojn. Antaŭnelonge li publikigis por la indonezia lingvo ampleksan lernolibron, vortaron kaj konversacian libron. Tio estas tre grava, ĉar li rigardas Esperanton ne nur el eŭropaj sed ankaŭ el „aziaj okuloj".
El lia plumo devenas la malgrandaj poŝvortaroj Esperanto-Deutsch[1]) kaj Deutsch-Esperanto[2]), kun ĉirkaŭ po 12 000 artikolvortoj. Ili estas daŭre reeldonataj kaj ĝenerale haveblaj en la vendejoj.

2. Por la germana lingvo ekzistas nur kelkaj malnovaj ampleksaj Esperanto-vortaroj. Tio estas la vortaroj de Bennemann (1926)[3]), Christaller (1923)[4]), Loy (1923) [5]), kaj Wingen (1954)[6]),. Ili estas malnovaj kaj ne plu haveblaj. Nur de la vortaro de Wingen aperis antaŭnelonge represoj en FRG.
Kompreneble ankaŭ aperis en la pasinteco aliaj iom pli ampleksaj vortaroj Deutsch-Esperanto (ekz. de Stark 1911)[7]), sed ili ne estis leksikografiaj verkoj sed nur dulingvaj vortlistoj. La vortaro de Christaller ampleksas ĉ. 36 000 artikolvortojn, tiu de Bennemann ĉ. 31 000, de Loy ĉ. 13 000 kaj la vortaro de Wingen enhavas ĉ. 25 000.
La vortaroj ĉiam nur registras difinitan evoluo-staton de la lingvo kaj krome, dependas ankaŭ de la socipolitika pozicio aŭ ĉirkaŭo de la verkinto, kion klare demonstras la LEA-vortaro Esperanto-Deutsch de Nonnemann/Muravkin, kiu aperis 1933 en Berlin[8]).
Kun ĉirkaŭ 41 000 artikolvortoj kaj konsiderante la registron de la plej aktuala lingvo, la vortaro de Krause estas la plej ampleksa kaj samtempe plej moderna ĝis nun aperinta Germana-Esperanto-vortaro.
Parolante pri la amplekso oni devas konsideri, ke tiaj vortaroj reprezentas la tipon de tiel nomataj „mezaj vortaroj" (post la „poŝvortaroj"). Sekvas tria ŝtupo, la „grandaj vortaroj" ĝis 100 000 artikolvortoj. Ili aŭ ankoraŭ estas unuvolumaj (sed tiam volumegoj) aŭ jam duvolumaj kaj fine oni konas la kelkvolumajn akademiajn vortarojn.
Se jam estas maloftaĵo, ke nacilingva Esperanto-vortaro aperis en la meza serio, jam ege malofte vortaroj tiaspecaj havas pli ol 40 000 artikolvortojn. Ŝajne al tiuj apertenas la vortaro de Izdur/Kolčinskij el la jaro 1933[9]) kun laŭdire pli ol 60 000 vortoj. Sed mi ne vidis ĝin.
Antaŭnelonge tamen aperis grandega vortaro nacilingva-Esperanta, la japana-Esperanto-vortaro de Matsumoto[10]) kun pli ol 70 000 artikolvortoj. Kaj hungaraj leksikografoj planas eldoni vortaron kun 60 000 vortoj. Kiam aperos tiaj vortaroj por la aliaj ĉefaj „mondlingvoj" kaj aliaj naciaj lingvoj?

3. Ĉar ne estas antaŭvidebla la apero de ampleksaj fakvortaroj nacilingvaj-Esperantaj, la ĝeneralaj vortaroj devas tion konsideri kaj enteni konsiderindan parton de la pli malpli komunuzaj terminoj. Krome de moderna vortaro oni devas postuli la konsideron de modernaj vortoj el la nuntempa socipolitika vorttrezoro. La aŭtoro klopodis ĉion ĉi konsideri.

4. Pri la strukturo de la vortaro mem. Krom la leksikoregistra parto ĝi enhavas atentigojn por la uzantoj (p. 592 — 594), inkluzive liston de uzitaj mallongigoj. Ne estas klare, kial tiuj atentigoj troviĝas ĉe la fino de la libro. Bonvena estas mallonga informo pri la alfabeto de Esperanto kaj la prononco de la literoj. Kaj fine la libro ankaŭ enhavas literuman alfabeton (b — barbaro, ĝ — ĝirafo, ŭ — universo-hoko). Ĉar en fakaj tekstoj oni ankaŭ trovas literojn neesperantajn, la aŭtoro donas indikojn pri ties elparolo, ekz. q = kuo, w — ĝermana vo, ä — a tremao, ĉ — co pintohoko k. s.
Parolante ankoraŭ pri la strukturo de la vortaro kiel grandan mankon la recenzanto notas la mankon de konciza prefaco, en kiu oni povus (kaj devus) informi pri la specifeco de Esperanto kiel lingvo, ĝia funkciado en la praktiko, disvastigiteco k. t. p. Oni povintus ĉi-rilate orientiĝi je la vortaro de Bokarev:

Esperanto-russkij slovar' (Moskva 1974, kaj 1982 en 100 000 ekz.), kiu entenas leksikologian enkondukon de V. Grigor'ev (p. 7 - 17) kaj antaŭparolon de E. A. Bokarev pri la aktuala signifo de Esperanto (p. 18 — 25). Krom tio ĝi entenas skizon de la gramatiko de Esperanto (p. 479 — 488). Kaj ankaŭ la Russko-esperantskij slovar' de E. A. Bokarev (Moskva 1966) entenas skizon de la gramatika strukturo de Esperanto (p. 533 — 536). La argumento, ke tio ne estas kutima en la meza serio de vortaroj ĉe Enzyklopädie-Verlag, ne nepre estas konvinka. Pri la angla aŭ la rusa oni scias pli multe kaj havas malpli da superstiĉaj imagoj kaj fuŝaj konvinkoj ol pri Esperanto. Tiajn enkondukajn partojn havas i. a. la vortaroj nacilingvo-Esperanto por la angla, rusa, ĉeĥa, bulgara, hungara k. a. Sufiĉe nekutima estas, ke en la vortaro mankas bibliografio pri la uzitaj leksikografiaj helpiloj kaj vortaroj. Tian indikon aŭ kritikan eseeton oni trovas en multaj vortaroj de la tipo nacilingvo-Esperanto. Pri sia leksikologia-leksikografia labormetodo, feliĉe, la aŭtoro intertempe jam informis en „der esperantist" n-ro 118/2/1983, p. 25 — 27.

5. Detalan kaj celtrafan analizon de la vortaro oni nur povas fari post kelkjara intensa utiligo de la vortaro, sed trarigardinte almenaŭ partojn de la vortaro iom pli detale, oni povas i. a. konstati:

5.1. La aŭtoro evidente ne „elpensis" la Esperanto-ekvivalentojn (jes ja — ankaŭ tio

okazas, eĉ en la nuntempo!) sed baziĝis sur ampleksega sliparo de ĉ. 48 000 slipoj pri la aktuale ekzistanta lingvo kun multaj fontindikoj kaj ekzemploj (entute 150 000)[11]). Do la vortaro staras sur solida fundamento, kio gravas por eventualaj lingvaj diskutoj.

5.2. La aŭtoro ofte indikis la diversajn leksikologiajn ebenojn de la lingvo, ekz. **umg.** — umgangssprachig (ĉiutaga lingvouzo): **herum/kramen** — intr. umg. — trafosi, traserĉi; **herumdrücken, sich** refl. vag(ad)i, rest(ad)i; **sich um etw.** übertr. geschickt entgehen ruze eviti tion (233); **Herumtreiber** — m vagabondo, milder vagisto (233).

5.3. Kunmetaĵoj formitaj el la sama baza vorto estas registritaj en „nestoj": **Ski/anzug** m (kompleta) skivesto; Ausleihstelle f ski-pruntejo; Ausrüstung f ski-ekipajo; -bindung f ski-ligilo; -ferien Pl skiferioj Pl . . . (429).
Tamen la nestmetodo en Esperanto estas pli facile aplikebla ĉe la tipo Esperanto-nacilingvo. Pro tio inter **Schrei** — kri(eg)o kaj **schreien** kri(eg)i aperas multaj vortoj kun **Schreib-** (409 — 440).

5.4. Tre bone la aŭtoro respegulas la multsencecon de germanaj vortoj kaj donas la diversajn ekvivalentojn/ankaŭ sciencajn kaj teknikajn: **eingliedern** — enkorpigi, enmeti, enigi; aldoni (133) **Eingriff** — interveno, enmiksiĝo; Tech endentiĝo, Med operacio.

5.5. La aŭtoro konsideras la aktualan socipolitikan lingvouzon. Tiel ni trovos ekvivalentojn ĉe **Frieden** (paco) i. a. por: **den Frieden bewahren (erhalten)** — konservi la pacon, **den ~ gefährden** endanĝerigi la pacon; **Friedensbewegung** — pacmovado, **friedliche Koexistenz** paca kunekzistado (ne koekzistado!), **friedliche Nutzung der Kernenergie** — paca utiligo de nuklea energio k. t. p. (179). Ankaŭ realajojn specifajn por GDR oni trovas: **Nationale Volksarmee** — Nacia Popola Armeo (de GDR), **Volkseigener Betrieb** — popolproprieta entrepreno (bzw. fabriko od. uzino), **Volkssolidarität** interpopola solidareco; Massenorganisation in der DDR Organizo por Solidara Helpo (535) k. t. p. Tamen la ankaŭ donita traduko popola ĉambro por **Volkskammer** ŝajnas superflua ĉar preferinda „popola parlamento"!

Por la diskutita **Jugendweihe** Krause ne donas kontentigan tradukon per junulara-solenaĵo, ĉar tio signifas nenion aŭ ĉion ajn. Eble socialisma junular-solenaĵo (en GDR) estus pli klara kvankam pli longa. Restas la neceso trovi pli kontentigan tradukon.

5.6. Tre bonvenaj estas la multaj donitaj parolturnoj ofte de Zamenhof (Zam): **arm** — malriĉa . . . ~ **wie eine Kirchenmaus** Zam ŝi estas malriĉa kiel muso preĝeja (38), **Regen** — pluvo . . . **vom ~ in die Traufe kommen** Zam trafi el sub la pluvo en riveron, salti el la pato en la fajron (375).

5.7. La vortaro ankaŭ entenas fakvortojn kun la komunuzaj ekvivalentoj: **Kopffüßer** PL Zool kapopieduloj Pl, wiss. cefalopodoj PL (285), **Herz** — koro . . . ~**beutel** m anat. perikardo (234), **Genick** — nuko ~**starre** f Med. cerbospina meningito; umg. steifer Hals rigida nuko (196) k. t. p.

5.8. Kompreneble oni ankaŭ trovas kelkajn aldonindaĵojn aŭ eventualajn korektindaĵojn: ĉe **Ableben** — morto, forpaso (10) oni povus aldoni la ofte uzatan eŭfemismon „elmondiĝo", ĉe **Abstinenz** (14) ni trovas abstin(ad)o kaj la zamenhofan abstinenco sed ĉe **Abstinenzler** nur estas abstinulo kaj mankas abstinenculo. **allenthalben** — (ĉie) eĉ en la germana estas tute eksmoda ĉe **alltäglich** (21) oni nekompreneble ankaŭ trovas averaĝa kun la indiko **durchschnittlich.**

Ĉe kelkaj anti-kunmetaĵoj bedaŭrinde mankas la ekvivalentoj kun kontraŭ-: antifaŝisto (34), kontraŭfaŝisto, sed **Antihitlerkoalition** estas tradukita per kontraŭhitlera koalicio (34).

Do entute rimarketoj ne tro gravaj.
Konklude oni povas konstati, ke d-ro Krause verkis vortaron, kiu eltanas ĉiun komparon kun la kutimaj nacilingvaj vortaroj. Ke ekzistas tia vortaro Deutsch-Esperanto ne nur atestas la evoluintecon de Esperanto sed ankaŭ la paŝon faritan al profesia leksikografio Esperanta. Ni esperu, ke dum la sekvaj jaroj iam aperos de la sama aŭtoro la vortaro Esperanto-Deutsch, ankaŭ ege bezonata.

La vortaro estas ricevebla ĉe ĉiuj germanlingvaj libroservoj kaj ĉe UEA. Ĝi kostas 18 markojn (GDR) aŭ ekvivalentojn.

Notoj

1) Krause, E.-D.: Esperanto-Deutsches Wörterbuch. Leipzig (Verlag Enzyklopädie) 1967,
(Recenzoj en Esperanto 7-8/1968, Germana Esperanto-Revuo 7/1968)

2) Krause, E.-D.: Deutsch-Esperanto-Wörterbuch. Leipzig (Verlag Enzyklopädie) 1971,
(Recenzo en „der esperantist" n-ro 59/60)

3) Bennemann, P.: Esperanto Hand-Wörterbuch. II. Teil Deutsch-Esperanto, Leipzig (Hirt) 1926

4) Christaller, P.: Deutsch-Esperanto-Wörterbuch. Berlin-Dresden (Ellersiek) 1923
(Recenzo en Germana Esperantisto 1923, p. 183)

5) Loy, K. J.: Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto, Berlin-Dresden (Ellersiek) 1923

6) Wingen, H.: Wörterbuch Deutsch-Esperanto. Limburg 1954
(Recenzo en Esperanto 7-8/1958)

7) Starke, E./Starke, F.: Wörterbuch Deutsch-Esperanto und Esperanto-Deutsch. I. Teil: Deutsch-Esperanto Leipzig (Hirt) 1911
(Recenzo en Germana Esperantisto, B, 1913 (n-ro 134))

8) Nonnemann, H./Muravkin, H.: LEA-Wörterbuch Esperanto-Deutsch. Berlin (Arbeiter-Esperanto-Bund) 1933

9) Izgur, J./Kolĉinskij, V.: Bol'ŝoj russko-Esperantskij slovar'. Moskva, 1933.

10) Kp. „der esperantist" 118 (2/83) p. 26
(Recenzoj pri la vortaro aperis ĝis nun en Interlingvistika Informservo 1-2/1983, Esperanto aktuell (FRG) 4/1983; Informilo de Internacia Esperanto-Muzeo Wien 3/1983; Der Morgen, 22. 7. 1983 kiel Levsen-kontribuo n-ro 544, Monato 11/1983)

Detlev Blanke

La gazetaro pri ni en la jaro 1982: pli ol 300

1. Temoj

Lau la enhavo oni povas disdividi la temojn jene:

1. E. en la loka praktiko (kursoj, prelegoj, ekspozicioj k. a.)	128
2. Sciindajoj pri la planlingvo E.	45
3. Historio de E. kaj de la movado	22
4. E. en la sociutila (politika) agado	38
5. E.-konferencoj, kongresoj (en GDR kaj en eksterlando)	51
6. Intervjuoj kun aktivuloj	5
7. Internaciaj E.-aranĝoj en GDR	14

Krome aperis 24 fotoj.
Jen ni rompis la rekordon: 1982 aperis 303 artikoloj!
Evidente oni povus klasifi kelkajn artikolojn diversteme kaj multaj enhavas elementojn de kelkaj rubrikoj. Sed la klasifo nur havas orientigan valoron kaj montras i. a. la grandan signifon de la lokaj aktivecoj.
Ĝenerale oni povas fari kelkajn konstatojn:

a) Ĉiuj artikoloj informis serioze pri plej diversaj detaloj de E. kaj ĝia movado.
b) Kontraste al pasintaj jaroj estis ampleksaj artikoloj kaj eĉ kelkaj artikoloj serioj.
c) Pligrandiĝis la nombro de entreprenaj gazetoj, kiuj abunde informis pri E.
d) Montriĝas, ke la gazetoj volonte informas pri **konkretaj** rezultoj aŭ aferoj de E-movado kaj la planlingvaj problemoj.
e) Por plibonigi la sisteman kompleksan kolektadon de E-artikoloj rekomendiĝas gajni amikojn, kiuj observadas la koncernajn gazetojn kaj revuojn.
f) Por vere esplori la artikolojn oni bezonas la tutan artikolon, nomon de gazeto, urbon, partion/eldonanton/daton kaj paĝon — ĉion sendu tuj al la centra estraro.

Brunhild kaj Werner Pfennig

2. Gazetoj

2.1. **Serio „Der Morgen",** Berlin, LDPD: 19. 11. pri Esp.-kongresoj (529),1. 10. 82 pri E-kongresoj (526), 29. 10. diplomatoj je UK (528), 15. 10. Kongreso kaj kulturo (527), 3. 9. Fondo de IPE antaŭ 50 jaroj (524), 17. 9. 68a UK (523), 20. 8. Lingvo-kurso (523), 25. 6. Esperanto je la kongreso de KL (519), 6. 8. Mondvasta komunikado (527), 23. 7. E-kurso (521), 9. 7. Esperanto-teatro (520), 4. 6. Ideologio (518), 21. 5. Konsultiĝo en Jerevano (517), 7. 5. Dialektoj en planlingvo? (516), 16. 5. Vortfarado (515), 2. 4. Vortfarado (514), 12. 3. E-literaturo (512), 19. 3. Informoj (513), 19. 2. UEA kaj UNESKO (511), 8. 1. Esperanto en Kubo (509), 22. 1. UEA kaj UNESKO (510), 10. 12. Pisanica (531), 26. 11. Kongreslibro (530). 23 artikoloj

2.2. **Centraj gazetoj**
Neues Deutschland, SED: 2. 8. UK 1982; 29. 8. Esperanto en la Popola Altlernejo; 21. 8. Lingvo kiel instrumento por paco, ampleksa artikolo kun foto; 13. 8. Infanoj el la tuta mondo en Sofio; 14. 2. Historio de flago el Sovetunio, kun foto; 26. 7. UK 1982;
Deutsche Bauernzeitung, DBP: Februar, Pri E-aktivulo (foto);
Fahrt frei: 3/82, Laŭtparoliloj informoj en E en stacidomo;
Junge Welt, FDJ: 27. 7. UK 1982;
Die Trommel, JP: 12. 8. Esperanto-pioniroj kunvenis en Berlin; 7. 1. Artefarita lingvo Esperanto (foto);
BZ am Abend: 26. 7. UK 1982;
Wochenpost: 27. 8. Esperanto, pri kursoj;
Nationalzeitung, NDPD: 9. 8. Esperanto-pioniroj;
Berliner Zeitung: 12. 8. Pri laboristaj esperantistoj (amplekse);
Neue Zeit, CDU: 27. 7. UK 1982;
Tribüne, FDGB: 2. 8. UK 1982;
Sprachpflege: 1/82 Scienca komisio je GDREA; 2/82 Seminario pri interlingvistiko en GDR;
Der Morgen, LDPD: 26. 2. Pri hungara Esperanto-magazino;
Mitteilungsblatt, KB: 6/82 Distriktaj kunvenoj; 5/82 Internacia E-seminario en GDR; 3/82 E-broŝuro (Esperanto kaj scienco); 4/82 E-korespondajoj (historiaĵoj);
Sonntag, KB: 33/82 UK 1982;
Modelleisenbahner: 8/83 Pri fervojista E-kongreso; /82 Pri fervojista fakrondo en GDREA.
27 artikoloj.

2.3. **Potsdam**
Märkische Volksstimme, SED: 3. 9. Korespondajo el Britio; 11. 9. E-movado; 9. 11. E-istoj por paco; 2. 7. Kunlaboro kun ĝemela urbo el Bulgario; 6. 8. Pri E-tendaro de laboro kaj ripozo en H; 16. 7. Interlingvistiko; 24. 3. Pri historio de Esperanto; 4. 6. Intensiva kurso de junuloj (foto); 7. 1. E-literaturo; 9. 1. E-varbado pri kurso; 12. 1. E-kurso;
Brandenburgische Neueste Nachrichten, NDPD: 17. 11. E-broŝuro (Esperanto kaj scienco); 6. 3. E-broŝuro (Esperanto kaj scienco); 10. 3. E-medicinista konferenco; 2. 8. UK 1982; 11. 9. E-movado.

2.4. **Frankfurt/O.**
Kulturspiegel, SED: 8/82 Pri E-kurso;

Veranstaltungsplan, KB: 12/82 Ĉu vi konas Esperanton?; 11/82 E-kunveno; 2/82 Informo pri lingvo E.; 10/82 Rimarkoj pri lingvo E;
Teleexpress, SED: 2. 4. Pri E-rondo (foto);
Neuer Tag, SED: 24. 12. Pri E-rondo; okt./82 E-kongreso (foto); 21. 10. E-konferenco; 22. 10. E-konferenco (foto); 1. 9. E-kurso, pri lingvo E.; 3. 9. E-kurso, pri Esperanto; 14. 9. Pri E-movado; 31. 7. Kurso — informo; 14. 8. Pri E-movado; 20. 8. Pri E-kurso; 2. 2. Kunlaboro GDR — Bulgario; 24. 3. Varbado pri kurso; 2. 6. Pri E-rondo; 3. 6. Pri E-kurso; 12. 3. Pri E-rondo; prelego; 15. 1. Kontaktoj per E.; 22. 1. Pri grupa vivo; 24. 1. Pri fondo de nova E-rondo; 13. 1. Pri E-movado. 25 artikoloj.

2.5. **Erfurt**
Thüringische Landeszeitung, LDPD: 20. 1. Fundamenta demando pri E (foto); 27. 1. Medicina E-kunveno; 26. 2. Serĉado de e-isto; 10. 3. Salutoj okaze de virina tago; 10. 3. Broŝuroj en E; 10. 3. Renkontiĝo en Leipzig; 1. 4. E-ĉambro; 8. 6. E-istoj honorigis Oskar Kaufmann; 28. 8. E-kongreso; 17. 9. E-istoj — paco; 16. 10. E-kursoj; 22. 6. Honorigo por „morta lingvo"; 14. 7. Interkomprenilo el la retorto?; Aug. 1982 De Babel al internacia lingvo; 24. 11. Interlingvistiko — kio estas tio?; 9. 11. Ĉu vi scias, kio estas E?; dec/82 Postuloj de Comenius; 25. 10. Renkontiĝo el tri distriktoj;
Das Volk, SED: 19. 1. E-amikoj en Mühlhausen; 2. 2. Ekde kiam oni parolas E-ton?; 4. 2. Ekzemploj de aktiva kunlaboro; 20. 4. Kredo je sukceso; 29. 5. Sperto-interŝanĝo; 28. 5. Esperantistoj spertinterŝanĝis; 22. 7. Surprizo en Dienstedt; 23. 7. Unua vilaĝa E-rondo; 31. 8. E-istoj konferencis; 11. 9. Kiu havas intereson?; 18. 9. E-amikoj 15. 10. E-kurso; 23. 10. Ĉu vi konas E-ton?; okt./82 Prelego pri E; 22. 11. Koncize pri E; 1. 12. Hodiaŭ — E; 10. 12. Bad Langensalza kaj E; 23. 12. Nun organizite!; 15. 9. Tridistrikta E-renkonto;
Thüringisches Tageblatt, CDU: 7. 1. UK en E-movado; 5. 6. E faciligas studon de aliaj lingvoj; 4. 2. Pastoro kaj E; 18. 12. E en librejoj; 25. 9. E kaj filatelo; 20. 11. Dialogoj en E; 27. 7. UK; 21. 7. Ĉu humuro en E?; 10. 9. Planlingvo E;
Fahrzeugbau, SED: 11. 5. Ekspozicio; 25. 5. Pri laborista e-isto; 8. 6. Ekspozicio
Gummiwerker, SED: 17. 6. Antaŭ 50 jaroj; 1. 7. E-samaritano;
Die Unruh, SED: Monda problemo — energio. 52 artikoloj.

2.6. **Karl-Marx-Stadt**
Union, CDU: 25. 10. Pri E-movado;
Freie Presse, SED: 7. 5. E-kurso intensa; 19. 5. Amikaro de E; 10. 3. E-rondo invitas; 18. 4. E-intensa kurso; 31. 3. E-kurso; 14. 1. Pri rondo; 10. 2. Kolektanto de pk lernis Esperanton; 26. 2. Turisma kunveno; 7. 1. E-entuziasmuloj; 29. 6. E-korespondoj; 27. 8. E-somera lernejo; 13. 10. Turisma kunveno; 27. 10. Varbado pri kurso; 21. 9. En Popola Altlernejo; 14. 10. Per E por mondpaco; 2. 9. Kurso por komencantoj; 16. 9. Pri rondo; 10. 6. Fino de kurso; 7. 7. Amikaro de E; 10. 7. Amikeca kunveno (foto); 8. 7. Lernu Esperanton; 29. 5. Pri kurso; 10. 6. Ronda vivo; 10. 7. Esperantistoj por paco (sovetaj E-istoj); 30. 6. E-sukcesa kursfino; 3. 7. Sovetiaj e-istoj venos; 7. 7. Kurso. 28 artikoloj.

2.7. **Cottbus**
Lausitzer Rundschau, SED: 2. 11. E-kunveno. 1 artikolo.

2.8. **Leipzig**
Sächsische Volkszeitung, SED: 13. 1. Laborrondoj de Kulturligo (foto); 16. 3. IFER '82; 19. 3. Goethe-honorigo en E; 6. 8. Vizito de sovetiaj esperantistoj; 19. 10. E-istoj en turisma kunveno; 22. 12. Socialisma brigado koresp. Esperante; 20. 12. Pri nova rondo, UK 82 (foto);
Mitteldeutsche Neueste Nachrichten, NDPD: 19. 2. Bulgara konstitucio en E; 15. 3. IFER '82; 2. 8. UK 82;
Sächsisches Tageblatt, CDU: 18/82 Anonco pri E;
Der Schmiedewerker, SED: jan/82 Prelego pri E; febr/82: salutoj el eksterlando; majo/82 E-humuro el Hungara Vivo; jun./82 E-humuro el Hungara Vivo; dec/82 Renkontiĝo kun GDR-kosmonaŭto (foto).

2.9. **Gera**
Die Volkswacht, SED: 10. 12. Ĉu vi konas E-ton?; 19. 8. Kontaktoj al Vjetnamio; 2. 2. E-kurso;
Thüringer Tageblatt, CDU: 9. 12. Kie oni lernas E-ton?
Thüringische Landeszeitung, CDU: 9. 12. Pri loka kaj internacia movado;
Thüringische Neueste Nachrichten, NDPD: 8. 12. Pri loka kaj internacia movado;
6 artikoloj.

2.10. **Suhl**
Freies Wort, SED: 28. 1. Semajnfina kurso; 4. 10. E-ekspozicio en altlernejo; 23. 12. Korespondo per E-o
Neue Hochschule, SED: 11. 10. Semajnfina kurso. 4 artikoloj.

2.11. **Dresden**
Union, CDU: 16. 1. Dialogoj; 13. 2. Prof. Einstein kaj E; 20. 3. Dialogoj: 15. 5. E en scienco; 5. 6. Facileco de E; 10. 6. KL-kongreso en Dresden, mencio de E; 10. 6. Historio pri E; 11. 6. E en Popola Altlernejo; 25. 9. E-pm el Soveta Unio (historio); 30. 9. Kunveno de Dresden; 16. 10. Infana E-teatro;
Sächsische Neueste Nachrichten, NDPD: 10. 9. Kurso en Popola Altlernejo; 12. 10. E por popola interkompreniĝo; 4. 6. Pri kulturliga kongreso (mencio de E);

Sächsisches Tageblatt, LDPD: 2. 1. Portreto pri aktivulo (foto); 11. 2. Kurso finiĝis; 12. 2. Pri E-movado kaj lingvo; 12. 3. E-kunveno, kurso; 16. 4. Pri E; 14. 5. Printempa pacmarŝo en ČSSR; 17. 6. Forumo en klubo; 8. 8. Pri E-historio; 1. 10. E-renkonto; 10. 12. 100 jaroj E; 19. 9. E-konferenco; 18. 9. E-renkonto;
Sächsische Zeitung, SED: 23. 5. Pri E-historio; 9. 6. Popola Altlernejo — E-kurso; 19. 6. E-kunveno el tri landoj; 20. 7. E-MEM-kunveno; 10. 6. Kulturliga landa kongreso (E-mencio); 20. 5. Migrado kun e-istoj; 4. 6. Kunveno de KL en Dresden. 33 artikoloj.

2.12. **Schwerin**
Norddeutsche Zeitung, LDPD: 17. 6. E-korespondado; 21. 12. Esperanto-amikaro; 29. 12. Pri interlingvistiko;
Demokrat, CDU: 16. 1. Dialogoj (E-kurso); 13. 2. E kaj prof. Einstein; 17. 4. Dulingveco en familioj; 20. 3. E-kurso; 5. 6. E faciligas studadon de naciaj lingvoj; 23. 6. Renkontiĝo kun hungaroj; 17. 6. E-korespondado, pri la movado; 2. 8. UK 82; 27. 6. E kaj scienco; 21. 10. Nova E-kurso;
Schweriner Volkszeitung, SED: 23. 6. Vizito el Hungario; 27. 7. E per koresponda kurso; 4. 8. Intensivkursoj;
Norddeutsche Neueste Nachrichten, NDPD: 23. 6. Vizito el Hungario. 17 artikoloj.

2.13. **Magdeburg**
Afiŝo/jara programo (Volkshochschule): 1982 Pri E-kurso;
Aktivist Schwermaschinenbau, SED: 4/82 Kio estas E?; 5/82 Pri E-movado; 6/82 Pri strukturo de E; 8/82 Pri strukturo de E; 16/82 Pri strukturo de E. 6 artikoloj.

2.14. **Halle**
Freiheit, SED: 2. 6. Lernanto en E-kurso (foto); 20. 8. E en Popola Altlernejo; 21. 8. Gastoj el Hungario; 20. 10. Amikoj de E-rondo;
Neuer Weg, CDU: 7. 2. Prof Einstein kaj E; 27. 6. E en Popola Altlernejo; 27. 6. E kaj scienco; 24. 8. E en Popola Altlernejo; 20. 11. E-kurso; 17. 12. E-kurso, E en librejoj;
Liberaldemokratische Zeitung, LDPD: 19. 6. Pri E-historio kaj movado (foto); 31. 7. Pri E-historio kaj movado (foto); 19. 8. Gastoj el Hungario; 21. 8. E en Popola Altlernejo; 21. 8. Interlingvistiko; 11. 9. Pri E-historio, Comenius (foto); 1. 10. Planlingvoj; 6. 11. Pri MEM, E-movado. 18 artikoloj.

2.15. **Rostock**
Ostseezeitung, SED: 31. 1. Raporto de Kulturligo; 2. 2. Raporto de Kulturligo; majo/82 E-konferenco de nordaj distriktoj; 26. 7. UK 1982; 8. 7. Vizito de esperantistoj en ČSSR; 9. 7. Kunveno de E-pioniroj; 2. 8. UK 1982; 10. 9. Pri E-movado; jan./82 Anonco de Popola Altlernejo pri kursoj; 11. 11. E-poŝtkarto-rondo; 17. 9. Nova kurso;
Demokrat, CDU: 2. 8. UK 1982; 12. 11. Kunveno de kolektantoj de pk;
Norddeutsche Neueste Nachrichten, NDPD: 20. 2. Pri en Bulgario; 9. 7. Vizito en ČSSR; 9. 7. E-rondo de pk-kolektantoj; 18. 9. Pri Ostwaldt-libro;
Unsere Werft, SED: 17. 9. Varbado pri E;
Werftecho, SED: 23. 4. Kurso;
Kulturspiegel: julio/82 Pri E en ŝipfareja muzeo (foto). 20 artikoloj.

2.16. **Neubrandenburg**
Freie Erde, SED: 3. 3. Kurso; 6. 3. Prelego; 28. 1. Anonco de Popola Altlernejo; 26. 2. Prelego pri E; 24. 2. Informo pri rondoj en Kulturligo; 13. 3. Broŝuro en E; 21. 9. Kurso; 9. 9. Kurso; 4. 9. SEFT-82; 7. 9. Prelego pri E; 22. 10. E-junulara konferenco en Neubrandenburg; 20. 11. Prelego pri UK;
Demokrat, CDU: 7. 9. Prelego pri E; 9. 9. Kurso;
Norddeutsche Zeitung, LDPD: 17. 6. E — interesa hobio, intervjuo (2 fotoj);
Elan, SED: 8. 3. E-kurso. 16 artikoloj.

3. **Jen la superrigardo**
Cottbus — 1, Suhl — 4, Gera — 6, Magdeburg — 6, Potsdam — 16, Leipzig — 16, Neubrandenburg — 16, Schwerin — 17, Halle — 18, Rostock — 20, Frankfurt/O. — 25, Karl-Marx-Stadt — 28, Dresden — 33, Erfurt — 52 (!) Komparu kaj konkludu!

SEMINARIO DE UKRAINIAJ ESPERANTO-INSTRUISTOJ

La 7 — 9an de majo 1983 en ukrainia urbo Poltavo okazis la Unua ukrainia respublika seminario de Esperanto-instruistoj. La seminarion laŭplane organizis Ukrainia respublika filio de ASE. Ĝia prezidantino estas konata ne nur en Ukrainio estimata Jekaterina Majburova.

La seminarion en Poltavo partoprenis reprezentantoj el 26 urboj kaj loĝlokoj de UkrSSR. Inter la deko da prelegintoj estis multaj spertaj profesiaj instruistoj. Mi plezure nomas la konatan aŭtoron de la lernolibro de Esperanto docenton el u. Kirovograd Kerner A.A. Li prelegis pri la temo: „Metodologia analizo de la sovetiaj Esperanto-lernolibroj de la unua kaj dua periodoj". La katedrestro de la rusa lingvo en Donecka ŝtata universitato docento Kornilov V. A. bonege prelegis pri „Esperantologio. Nuntempa stato de la interlingvistiko". Interesan prelegon pri la rekta metodo de Andreo Če prezentis Leon Zimels el u. Ternopolo. Aliaj prelegoj ankaŭ elvokis viglan intereson kaj atenton de la partoprenintoj.

Necesus diri, ke la seminarion partoprenis ne nur instruantoj en la kursoj kaj rondoj, sed ankaŭ sufiĉe granda vico da profesiaj instruistoj el la lernejoj kaj pedagogiaj in-

⟨daŭrigo p. 126⟩

5-a interlingvistika seminario

De 30a de oktobro ĝis 3a de novembro 1983 en Ahrenshoop okazis jam tradicia aranĝo, la ĉiujara interlingvistika seminario, aranĝata por lingvistoj, pedagogoj kaj aliaj sciencistoj neesperantistoj. Ĉi-jare la kvina havis la kadran temon „lingvokonfrontado sub interlingvistika aspekto". Partoprenis 32 sciencistoj, kiuj reprezentis tri universitatojn (Berlin, Leipzig, Halle), kvin inĝenierajn resp. teknikajn altlernejojn (Zittau, Ilmenau, Dresden, Berlin, Wismar), tri pedagogiajn altlernejojn (Güstrow, Dresden, Potsdam), la altlernejon por ekonomio en Berlin, du akademiojn (Akademio de sciencoj de GDR kaj la Akademio por pedagogiaj sciencoj), kaj partoprenis reprezentantoj de aliaj centraj institutoj, eldonejoj, kiel kutime.
La seminarion organizis la fakgrupo interlingvistiko/esperantologio en Kulturligo de GDR kunlabore kun Humboldt-Universitato Berlin (prof. d-ro Georg Friedrich Meier). Dum la seminario oni aŭskultis jenajn prelegojn:

— Malfermo: prof. d-ro Georg F. Meier Humboldt-Universitato Berlin)
— Interlingvistiko kaj planlingvoj: informoj kaj pozicioj (d-ro Detlev Blanke, GDREA)
— Analizo de Esperanta teksto (prof. d-ro Georg F. Meier/d-ro Erich-Dieter Krause, Karl-Marx-Universitato Leipzig)
— Kelkaj rezultoj kaj tendencoj en la lasta evoluo de interlingvistiko (d-ro Detlev Blanke, GDREA)
— Ĉefaj evoluoj en la kreo de planlingvoj (d-ro Detlev Blanke, GDREA)
— Esperanto kiel objekto kaj instrumento de elektronika datumprilaborado (d-ro Paul String, Robotron, Dresden)
— „Lingvo 2000" de Lothar Hoffmann (Prezento de d-ro Paul String, Robotron Dresden)
— La rolo de vortradikoj en la vortfarado de Esperanto (prof. d-ro Joachim Dietze, Martin-Luther-Universitato Halle)
— Konfrontado Esperanto-Deutsch ĉe deadjektivaj verboj (d-ro Detlev Blanke, GDREA)
— La esprimo de sekso en etnolingvo kaj planlingvo (d-ro Erich Spitz, ĈSSR)
— La afiksaj sistemoj de la Bahasa Indonesia kaj de Esperanto en konfronta prezento (d-ro Erich-Dieter Krause, Karl-Marx-Universitato Leipzig)
— La gramatikaj kategorioj konfronte: Esperanto kaj etnolingvoj (prof. d-ro Georg F. Meier, Humboldt-Universitato Berlin)
— Esperanto kiel objekto de instruado (d-ro Till Dahlenburg, GDREA)
— Lingvokomparo en la fremdlingva metodiko (d-ro Wolf-Dietrich Wendt, Humboldt-Universitato)
— Internaciismoj en Esperanto: klerigo-aspektoj (d-ro Till Dahlenburg, GDREA)
— Aŭtomata laŭvorta traduko (prof. d-ro Erich Mater, Teknika Altlernejo Ilmenau, prezentita de d-ro Hans-Joachim Hußner)
— Esperanto en la praktiko (d-ro Detlev Blanke, GDREA)

Kiel la antaŭaj seminarioj ankaŭ tiu 5a distingiĝis per ege vigla diskuto.
Libroekspozicio pruvis al la seminarianoj la ekziston de riĉa faka literaturo pri interlingvistiko kaj esperantologio. La 6a seminario okazos fine de 1985 denove en Ahrenshoop.

D. B.

Propono

La subskribintoj renkontiĝintaj dum la unua Interlingvistika kaj Esperantologia Simpozio ⟨Italio⟩
analizante la nunan situacion de la scienca esplorado de la Internacia lingvo kaj ĝia supera (universitata) instruado, faras al la kompetentaj instancoj la jenan proponon:

1. La Budapeŝta Universitato estas la sola Universitato kie la Internacia Lingvo estas oficiale enkadrita en la scienca esplorprogramo kaj universitata-nivela instruado. Tial estas la unusola Universitato, kiu rajtas doktorigi el Interlingvistiko kaj Esperantologio. En Eŭropo kaj ekster Eŭropo estas multaj junaj diplomitoj deziratantaj akiri doktorecan titolon en la supre menciitaj du fakoj. Tiel oni proponas trovi la eblon, ke tiuj, kiuj cetere kontentigas la leĝajn kondiĉojn, povu doktoriĝi en la Filozofia Fakultato de la Universitato Eötvös Lorand, antaŭ internacia komisiono, en la Internacia Lingvo. La subskribintoj entreprenas prilabori la konkretan ekzamenan regularon laŭ la validaj kadraj kondiĉoj.
2. Ni konsideras, ke por la scienca esplorado, priskribo, analizado kaj pluevoluigo de la internacia lingvo, anstataŭ la movadaj organizajoj estas pli konvenaj la Universitataj kadroj, kie la supraj laboroj povus esti integrotaj en la esploraj programoj de la koncerna katedro. La subskribintoj petas la plej altajn movadajn organojn interveni ĉe la universitataj instancoj akcepti,ke la Esperanta Fako estu samtempa loko de SEC (Scienc-Esplora-Centro) de UEA kaj ĝi gvidu la laborojn de la normaj dokumentoj de la Internacia Lingvo (fonetiko, gramatiko kaj leksikografio), prilaborendaj ĝis la 100-jariĝo (1987).

La substribintoj estas konvinkitaj, ke la efektivigo de la supraj du petoj alportas utilon unuavice al la internaci-lingva movado, sed samtempe altigus ankaŭ la reputacion de la akceptonta universitato.
Massa, la 4an de majo 1983
Prof. d-ro Giordano Formizzi
(Universitato Verona — I)
Prof. d-ro Fabrizio Pennachietti
(Universitato Torino — I)
Prof. d-ro Helmar Frank
(Universitato Paderborn — D)
Prof. d-ro Istvan Szerdahelyi
(Universitato Budapest — H)
Noto de la redaktoro:
Ni publikigas la proponon pro ĝia ĝenerala graveco. Tamen tio ne signifas, ke ni ne vidas kelkajn diskutindajn punktojn (SEC kaj la universitato, la aserto pri nura eblo doktoriĝi pri interlingvistiko/esperantologio en Budapesto k. a.).

Rumanio: Esperantistoj en scienca sesio

El la prezidio. Prof. Bociort (staranta) fondinto kaj nuna honora prezidanto de la Kolektivo Esperanto/Interlingvistiko ĉe la universitato Timisoara.

Dum la 28/29a de majo 1983 okazis en la Universitato en Timisoara granda scienca sesio. Mi asertas „granda", ĉar la nombron de 718 sciencaj referaĵoj oni devis prezenti en 46 sekcioj. Ĉar ĉiu sekcio ne devis superi pli ol 15 referaĵojn, ni esperantistoj pro 26 verkoj, kiujn oni volis prezenti, estis dividitaj en 2 sekcioj: interlingvistiko kaj esperantologio. La prezentitaj verkoj estis la jenaj:

1. Semantika analizo de kelkaj estetiko-taksaj adjektivoj en Esperanto: Viktoria Stroescu
2. Nomo de agento en rumana, angla kaj Esperanta lingvoj: Aurelia Andreika
3. Esperanto en kibernetiko; prof. Aurora Bute
4. Aspektoj pri esprimoj de tempo en franca kaj Esperanta lingvoj: prof. Angela Cosma
5. Principoj de la studado de Esperanta literaturo: stud. Mariana Neagu
6. Esperanto kaj la paco. Du neeldonitaj dokumentoj: doc. d-ro Cezar Apreotesei
7. Esperanto kaj problemo de perantaj lingvoj, utiligataj de tradukaj maŝinoj: doc. d-ro Minerva Bocşa
8. Deklinacio de substantivo en rumana, Esperanta, franca, angla kaj germana lingvoj: prof. Luminita Bocsa-Frentiu
9. Mallongaj prozajoj de la esperantista literaturo: stud. Renate Jano
10. Pri la evoluo de poezia lingvo de la Esperanta literaturo: prof. Clara Marinov
11. Esperanto — komunikadlingvo en la internaciaj renkontiĝoj: inĝ. Ioan Chioreanu
12. Leksika kaj semantika observoj pri la vortfarado en Esperanto (devioj): d-ro Liviu Podariu
13. Diskuto pri Esperanta elparolo: stud. Lucia Turmac
14. Interlingvistiko. Problemoj kaj rezultoj: lekt. d-ro Hans Gehl
15. La kazoj en Esperanto: asist. Gertrude Schmidt
16. Gramatikaj problemoj en „Plena Ilustrita Vortaro" de Esperanto: prof. Mioara Lacrima Dobre
17. Komentarioj sur marĝeno de kelkaj freŝdataj pozicioj en rumana interlingvistiko: prof. d-ro I. F. Bociort
18. Estetikaj rimarkoj pri Esperantaj poeziajoj: prof. I. F. Bociort
19. La biblioteko kiel kibernetika sistemo: stud. Iozefina Balat
20. Nuna nivelo kaj situo de la interlingvistiko en Rumanio: doc. d-ro Cezar Apreotesei
21. Esperanto kaj lingvistika komunikado: inĝ. Dorin Hehn
22. La interlingvistika personeco de L. L. Zamenhof: stud. Tatiana Dabela
23. El la historio de Esperantaj periodaĵoj: lekt. d-ro Hans Bettisch
24. Esperanto en beletristikaj tradukoj: stud. Angela Halmageanu
25. Esperanto kaj la kibernetika pedagogio: lekt. d-ro Romeo Poenaru
26. Romanverkistoj de la Esperanta literaturo: stud. Cezara Vintilescu

Kelkaj referaĵoj estis prezentitaj rumane aliaj Esperante kaj aliaj parte rumane, parte Esperante.

Mi povas atesti, ke la debatoj el nia sekcio (ĉar la du supre menciitaj sekcioj kune disvolvis la laborojn) estis unu el la plej aktivaj kaj fruktodonaj sekcioj. Kadre de nia sekcio oni tre vigle kaj fervore debatis la referaĵojn. Oni starigis multajn problemojn precipe pri: neologismoj, vortfaradoj, lingva evoluo, pozicio de rumanaj scienculoj (kiuj ĝenerale fariĝis pli favoraj), k. t. p. La prezidio el la du sekcioj atribuis premion al la studentino Lucia Turmac (temo 13).

Hazarde kaj feliĉe la nuna scienca sesio koincidis kun la 5a datreveno de la naskiĝo de nia „Kolektivo de Esperanto kaj Interlingvistiko (29. majo 1978).

Laste profesoro I. F. Bociort anoncis la aperon de du broŝuroj — Esperante verkitaj — en la seminario pri literaturteorio en la Fakultato pri filologio el Timiŝoara. Ambaŭ broŝuroj estas science altnivelaj kaj pritraktas estetikajn problemojn.

Li ankaŭ anoncis, ke baldaŭ aperos kadre de la Universitato el Timiŝoara du Esperantaj lernolibroj (elementa kurso kaj scienca antologio).

D-ro Liviu Podariu

Moderna lernolibro

De Smet: Esperanto snel assimileren. Een snelkursus van de internationale taal Esperanto in vijf lessen (plus tien lessen verdere uitbouw) voor zelfstudie. Uitgeverij De Nederlanden, Antwerpen, 1982, (151 pp.).

Tiu ĉi lernolibro allogas metodikiston de fremdlingvo-instruado per sia unika strukturo rilate la prezentadon de la lingva materialo kaj per sia ĝeneralkleriga enhavo.

La aŭtoro intencas evoluigi ĉe interesemuloj la regad-kapablojn koncerne Esperanton en tri fazoj. La unua fazo koncentriĝas al la kompreno de skribitaj tekstoj, la dua fazo estas dediĉita al la kapablo verki mallongajn skribajn informojn, ekz. leteron, resumon, raporton, la tria fazo alcelas la kapabligon de la lernanto uzadi Esperanton buŝe en la ĉiutaga vivo: laŭ tiuj ĉi nomitaj celoj la unuopaj fazoj nomiĝas „1. Esperanto leren lezen" (pp. 11-69), „2. Esperanto leren schrijven" (pp. 71-107), kaj „3. Esperanto leren spreken" (pp. 109-143). Finfine la verkinto konsekvence konsilas al la studintoj: multe legu, multe skribu, multe parolu kaj aŭskultu!

La priskribita konstru-maniero estas lerte fundamentita, ĉar ĝi respektas la rilaton inter reproduktivaj kaj produktivaj kapabloj ĉe la „disĉiplo": ekde legado tra skribado al parolado, aŭ, per aliaj vortoj, de la okuloj per la mano al la buŝo. Por la plimulto de ĝermandevenaj popoloj la plej komplika afero je lingvolernado fakte estas la buŝa aplikado de iu ajn studata fremdlingvo, pro tio la aŭtoro ne tuj postulas tian strečadon, sed gvidas la lernantojn tra kampoj, sur kiuj ili preskaŭ senkonscie a n k a ŭ rikoltas iomajn spertojn en la buŝa lingvoaplikado; ni ĉiuj — legante aŭ skribante iun tekston, sentas nin akompanataj de ena, tempaltempe eĉ aŭdebla prononcado, de silenta flustrado.

Enkadre de la esperantlingvaj kaj flam-lingvaj ekzercoj ĉiu frazo estas ciferita; tiamaniere la necesaj lingvaj aŭ enhavrilataj klarigoj, kiuj sekvas la unuopajn legaĵojn, estas facile troveblaj kaj la trankvila encerbigo de la plejparte tre instiga enhavo ne estas interrompata.

Due — pri la enhavo:

La uzontoj de tiu ĉi lernolibro devas nature interesiĝi pri literaturo, pri diversaj sciencbranĉoj, pri politiko ktp., por ke ili havu spiritan kontakton kun la aŭtoro kaj por ke ili ne laciĝu sekvadi la subtilajn intencojn, la spritajn sugestojn kaj la informriĉajn klarigojn. Prave en la enkonduka parto estas emfazita, ke la lernolibro turnas sin al klera publiko:

> „De auteur probeert op die manier een eenvoudige taal te presenteren aan een intellektueel publiek." (p. 9.)

Trie — ĉu ekzistas plibonigendaĵoj?

Nia lingvo Esperanto estas nomata „neŭtrala mondlingvo" (p. 122), ĝi taŭgas por krei novan tipon de homo, sennaciulon (p. 95), ĝia studado estos malferminta la cerbon al aliaj idiomoj kaj faciliginta ties asimiladon (p. 81). Mi supozas, ke la supraj „sentencoj" respegulas la opinion de la aŭtoro — alie li ne estus citinta ilin — kaj permesas al mi la provokan (?) demandon: Ĉu Esperanto ne fariĝas rimedo por plivastigi eŭropocentrismajn ideojn, ĉu la lernolibro liveras la pruvon, ke pere de Esperanto oni povas malfermi la cerbon al aliaj (al kiom da?) idiomoj?

La argumentado por Esperanto en tia metodikflanke altnivela lernolibro devus esti pritraktata pli elaste, por ke „een intellektueel publiek" konatiĝu ankaŭ kun seriozaj kontraŭargumentoj kaj kun ĝis nun nesolvitaj problemoj de interlingvistiko resp. esperantologio. La tria fazo, kie temas pri la parolalproprigo, ne estas tiel ampleksa, kiel ĝi estas anoncita en la enhavtabelo (pp. 109 — 143); praktike ĝi limiĝas je naŭ paĝoj (inkluzive kvin paĝoj da klarigoj), sed — bedaŭrinde — ne estas daŭrigata per aliaj vivproksimaj, rapide asimileblaj „hazardaĵoj" (memoru la titolon de la libro: „Esperanto snel assimileren").

⟨fino p. 129⟩

El Vjetnamio

Kluba jubileo en Ho-Chi-Minh-urbo

La unuan datrevenon de la Esperantista klubo estis solene celebrita ĉe la Kulturdomo je 15a de aprilo 1983.
Pli ol cent ĉeestantoj, inter ili gvidantoj de urba distrikta oficejo, centraj komitatanoj de VPEA, geveteranoj de nia movado, gemembroj kaj gelernantoj de Esperanto-kursoj Phu Nhuân.
Sa-no Nguyên Do Khánh per sia kondensa jarraporto detale sciigis pri la E-agadoj dum pasinta jaro, pri atingoj de E-movadoj en socialismaj landoj kaj en la mondo kaj prezentis la planon por jubileoj: 30 jaroj de MEM, 75 jaroj de UEA kaj por bonveno al 68a UK Esperanto en Budapeŝto — Hungario.
Reveninte de Leningrado, s-ano Dang Quang Minh rakontis pri la amika renkontiĝo kun sovetiaj geesperantistoj kaj jam transdonis paketon da E-presaĵoj, donace de klubo „Espero" Leningrado.
Nia verkisto Nguyen Hai Trung taksis la gravecon de la Pacmovado por homaro kaj tutmonda esperantistaro.
La junaj E-aktivuloj entuziasme ricevis donacaĵojn kaj gratulojn de Direktorino de Kulturdomo Bich Hiêp.
S-ino Hoang Minh Phung festis la ceremonion leginte la poemon „Saluton al vi, Esperanto-klubo nia". Sekve multaj E-kantoj entuziasmigis la atmosferon.
La Estraro de la E-klubo invitis gastojn, gemembrojn, gekursanojn rigardi la E-ekspozicion (Esperantaĵoj: presaĵoj, korespondaĵoj, pk kaj belej turismaj prospektoj).
La ĉeestantoj estis optimistaj kaj kredante, ke ankoraŭ multaj aranĝoj okazos en la klubo, oni promesis unu al aliaj ofte viziti por lernado, kunveno, kantado, konversacio kaj distriĝo.
Dankon al vi por viaj multaj pk, gratulleteroj kaj presaĵoj, senditaj pasintjare. Helpu nian novan, junan klubon. Nia adreso: Cau Lac Bo, Quoc te ngu Esperanto, Nha Van Hoa, 6 Mac dinh Chi Q.I Hochiminh. VN

VJETNAMO EL LA KORO

En letero datita la 20an de aprilo 1983, S-ano William Gilbert, ĝenerala sekretario de MEM, informis al Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA) jene: S-ano Felician Olivan, hispana kuracisto kaj pacbatalanto kontraŭ faŝismo elmigrinta en Francion, de longe aktive agadis subtene al la vjetnama popolo en ĝiaj bataloj kontraŭ la francaj koloniistoj kaj usonaj imperiistoj. Li travivante sian maljuniĝon en Hispanio, komisiis al S-ano William Gilbert fari ĉion necesan post sia forlaso de Francio por transdoni ĉiun lian proprajon en Grenoble donace al la Vjetnama Nacia Biblioteko kaj al la biblioteko de VPEA, kun la perado de la Vjetnama Ambasadejo en Parizo, kio konsistas el multaj valoraj libroj en Esperanto kaj en aliaj fremdlingvoj pri literaturo kaj sciencteknikо.
En la jaro 1966, Samideano Felician Olivan, post sia petskribo estas oficiale rekonita de la Nacia Fronto de Liberigo de Suda Vjetnamio kiel „honora batalanto" en ties vicoj. Tiu fakto vekis grandan emocion kaj efikis kiel stimulo por nialanda esperantistaro, cetere por ĉiuj vjetnamaj batalantoj. Tiuokaze li al ni skribis:
„Franjo Kujen (en „Tiel li vivis") parolas pri si enpasante en la malliberejon Ĉi Hoa, matene de la 15a-oktobro 1964: „Neniu edzino de mortkondamnito estas tiel trankvila, tiel serena, kiel mi en tiu momento" — Nun, mi povas diri: „Neniu soldatvarbito en la mondo estas tiel konsenta kaj tiel fiera al si kiel mi ekde la 16an de pasinta marto, estas tago en kiu mi ricevis la plej valoran kaj honoran leteron por mia vivo" . . . En alia letero adresita al NFL de Suda Vjetnamio, li skribis: „De nun, mia devo estas senmezure altigita, en la komuna lukto por monda paco kaj por libereco al la glora vjetnama popolo. Tial, mi bone konscias pri mia devo, forlasante nenian okazon aŭ rezignante nenian dangeron por defendi la grandan justecon de la vjetnama popolo."
La cititaj vortoj de S-ano Felician Olivan bone respegulas la animstaton de multaj esperantistoj tra la mondo, kiuj aprobis kaj subtenis la justan aferon de nia vjetnama popolo.
La vjetnamaj esperantistoj kaptas ĉi okazon por esprimi sian profundan dankon al S-ano Felician Olivan pro aliaj antaŭaj aktivecoj subtene al Vjetnamio kaj pro lia nuna belega gesto ĉe la lasta sojlo de lia tre nobla vivo.
El la fundo de niaj koroj, ni sincere deziras al S-ano Felician Oolivan — „vjetnamo el la koro" kiel li foje sin nomis — baldaŭan resaniĝon kaj longan vivon, por plu servi al la nuntempa lukto por la paco kaj la vivo de la tuta homaro fronte al la minaco de nuklea milito.
Ni cetere dankas samideanon William Gilbert, la alia elstara amiko de Vjetnamio, pro liaj helpoj por la plenumado de la nobla tasko konfidita de S-ano F. Olivan kaj pro lia akurata informo.

La centra buroo de VPEA.

Plia antaŭenpaŝo de Esperanto en Hanojo

De ĉirkaŭ du jaroj ĉe la Vjetnama Filologia Instituto fondiĝis studgrupo de Interlingvistiko kaj Esperantologio eklaborante sub la aŭspicio kaj gvido de ties direktoro, prof. Hoang Tue kaj kun la helpo de ties scienca kunlaboranto, s-ano Dao Anh Kha. En aŭgusto de 1983j. dank al helpo de la Bulgara kaj Sovetia Esperanto-asocioj la studgrupo sukcesis sendi sian estron, f-inon Vu Thanh Huong al la studado ĉe la Konstanta Internacia Kvalifikejo en Varna (Bulgario).
La studgrupo nun daŭrigas sian laboron kaj bezonas kontaktigi kun diverslandaj sam-

fakaj organizaĵoj kaj kolegoj, precipe ilian helpon por la starigo de biblioteko de Esperanto, Interlingvistiko ĉe la Instituto. Cetere ĝi bezonas esti invitota al diverslandaj seminarioj pritraktantaj la temon.
Kun antaŭdanko ni anoncas jene nian adreson: Prof. Hoang Tue, Filologia Instituto, 20 Ly Thai To str., Hanojo/Vjetnamio.

Vu Thanh Huong

LA 30-JARA JUBILEO DE MEM EN HANOJO

La 16an de septembro 1983, Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio organizis kunvenon jubileante la 30-jaran fondiĝon de MEM ĉe la Domo de Amikeco en Hanojo.
Partoprenis en tiu soleno, VPEA-komitatanoj, ĝiaj gemembroj kaj Esperanto-lernantoj en la ĉefurbo. Krome ĉeestis la reprezentantoj de diversaj oficoj kultura, gazetara kaj la Vjetnama Informo-Agentejo.
Ĉiuj partoprenintoj kun granda intereso aŭskultis la paroladon far S-ano Dao Anh Kha, la ĝenerala sekretario, kiu raportis pri la aktivecoj kaj atingaĵoj de MEM dum la 30 pasintaj jaroj, speciale pri ĝiaj viglaj kaj fruktodonaj kunlaboroj kun la Monda Packonsilio, kaj alte aprecis la ĉiam kreskantan influon de MEM en la tutmonda esperantista medio serve al la tuthomara lukto kontraŭ la vetarmado, la instaligo de novaj misilbazoj, la produktado de novaj amaspereigaj armiloj kaj nukleaj kaj ĥemiaj; serve al la nunepoka lukto por la malarmado kaj por garantiata paco, fronte al la minacoj de nuklea milito.

S-ano Dao Anh Kha cetere reliefigis la bonajn rilatojn inter VPEA kaj MEM, kun dankesprimoj citis la aktivecojn de MEM subtene al la vjetnama popolo en ĝia batalo kontraŭ la usona agresmilito antaŭe kaj en ĝia nuna porpaca afero de socialisma konstruado kaj patruja defendo.

Kun konvinko li skizis la belan perspektivon pri la ankoraŭ pli streĉa kunlaborado inter VPEA kaj MEM serve al la komuna granda afero de la mondaj popoloj por Paco kaj Vivo.

Enkadre de la soleno, la ĉeestantaro varme aplaŭdis la Esperantan kanton „Estu ĉiam la suno" prezentitan de vjetnamaj gepioniroj kaj aliajn belajn Esp-kantojn plenumitajn de du junaj esperantistinoj. Ĉe la fino oni kun plezuro spektis du Esperanto-parolatajn kolorfilmojn — donacoj valoraj flanke de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj — „60 jaroj de Soveta Unio" kaj „La lukto por Paco".

DANG DINH DAM

9-a kongreso de SEA

Kio estas SEA? Invitilon al sia 9-a kongreso sendis la konata AESSR. Pri SEA mi nur eksciis dum tiu kongreso mem.

Ĝi okazis de la 15-a ĝis 17-a de julio ĉijare en urbeto Žilina. Partoprenis pli ol 250 delegitoj kaj gastoj el Bulgario, Ĉeĥio, GDR, Hungario, Islando, Pollando kaj Sovetunio. Esprimo de la granda publika reputacio estis la ĉeesto de reprezentantoj de gravaj institucioj, i. a. urba komitato, nacia fronto kaj sindikato. Plej grave estis, ke la reprezentanto de la ministerio pri edukado kaj kulturo partoprenis la tutan kongreson kaj afable kaj abunde salutparolis. Reprezentantoj de BEA, GDREA, PEA, ĈEA kaj HEA salutis la delegitaron nome de siaj landaj asocioj.

La kongreso estis multaspekta. En (antaŭvespera) „libera tribuno" respondis tri gvidaj funkciuloj (inĝ. Zvara, d-ro Lukáč, inĝ. Nêmec) la demandojn de la delegitoj. Prezidanto Milan Zvara raportis pri la sukcesa agado de l'asocio de post la 8-a kongreso. D-ro Andrej Lukáč motivigis la ampleksajn statutŝangojn, kies plej gravaj estis la kunnodigo de Esperanto-Asocio al ministerio de edukado kaj kulturo (ĝisnuna: Nacia Fronto), kaj la ŝanĝo de l'asocia nomo al „Slovakia Esperanto-Asocio" (SEA). Ankaŭ la asocia organo „Esperantisto slovaka" ŝanĝiĝis laŭvizaĝe kaj enhave. Okazis diskutoj en diversaj laborgrupoj, komisionoj kaj pleno. La kongreso aprobis novan agadprogramon kun pretendema taskaro, nova statuto, rezolucio kaj elektis sian gvidorganon — la Centran Komitaton. Ĝin gvidas sepkapa prezidio sub la nova prezidanto d-ro Andrej Lukáč kaj la vicprezidantoj inĝ. Milan Zvara, d-ro Elemir Erby, inĝ. Vladimir Nêmec. Sekretariino elektiĝis inĝ. Eva Gajdošiková. La kondiĉoj en la „Domo de sindikatoj" estis ege favoraj kaj la prizorgo de la organizintoj laŭdinda. Riĉa kultura programo kompletigis la kongresan mozaikon, inter ĝi impona (parte esperantlingva) koncerto de profesoroj el la urba konservatorio, entuziasmige folklora ensemblo „Stavbár", filmprezentado, ekspozicio, abunda vendejo pri esperantaĵoj, lotumado ... kaj eĉ la surpriziga vizito de la „Grafo de Monte Kristo". Regis bonega etoso dum la tuta kongreso. Tiom pli mi bedaŭris adiaŭi de la afabla kaj ĉarma slovaka Esperantopopoleto.

Siegfried Linke

TUSE — 83: plena sukceso

Kiu ŝatas migri grupe en bela protektita naturo, tiu partoprenu dum „Turisma Semajno" (TUSE) en Slovaka Paradizo. Slovaka Paradizo estas la plej orienta parto de la Malaltaj Tatroj. La plej proksima urbo nordoriente estas Spišska Nova Ves ĉe trajnlinio Poprad-Košice.

Dum TUSE-83 partoprenis ĉirkaŭ cent personoj, krom ĉeĥoj kaj slovakoj grandaj grupoj da bulgaroj kaj hungaroj, kelkaj el GDR kaj unu esperantistino el Nederlando.

Ĉiu partopreninto povis tage elekti inter granda marŝo kaj samtempe malfacilaj vojoj aŭ mallonga kaj facila migro.

Per aŭtobus-veturoj oni ankaŭ konatiĝis kun la historia urbo Levoča, la glacia groto de Dobšina kaj kun la proksimsituanta altmontaro Altaj Tatroj: la ĉirkaŭaĵoj de Tatranska Lomnica kaj Štrbske pleso.

La organizantoj montris kelkjarajn spertojn, kiuj respeguliĝis en senproblema funkciado de ĉiuj gravaj aranĝoj.

Por venontaj Turismaj Semajnoj mi persone dezirus pli da partoprenontoj, kiuj bone scipovas la Internacian Lingvon.

Manfred Trenne

60 jaroj de Septembra Ribelo

En la jaro 1983 la bulgara popolo memoras la 60-jariĝon de unua kontraŭfaŝisma ribelo en la mondo. Kiel „septembran ribelon" de la jaro 1923 ĝi eniris la bulgaran historion. Ĉar ankaŭ multaj esperantistoj-laboristoj partoprenis la viktimriĉan batalon, tiu okazintaĵo estis digna kaŭzo por Bulgara Esperantista Asocio okazigi scienc-praktikan konferencon pri la ribelo kaj ties instruoj por la nuntempo.

Kiel delegito de GDREA mi partoprenis la solenan, impresriĉan konferencon inter reprezentantoj de hungara, pola kaj sovetia asocioj. El Sovetunio venis la Leningrada Esperanto-teatro en la mezbulgaran, belan kaj industrian urbon Stara Zagora, unu el la iamaj batalcentroj. La konferencon, kiu okazis la 11an — 12an de junio 1983, sekvis vizitoj en historiaj memorlokoj de nia bulgara frata popolo, solenaj kunvenoj kun lokaj reprezentantoj en Kazanlak, Plovdiv, Asenovgrad. La vizito en IEK Pisanica kompletigis la enhavriĉan programon post la konferenco ĝis la 16an de junio. Ĉar ne eblas, tie-ĉi priskribi la multajn, menciindajn detalaĵojn de la restado, estu redonita nur la ĝenerala impreso.

Kiel ĉiu vizito ĉe bulgaraj amikoj ankaŭ tiu-ĉi estis karakterizita de abundo da vigla gastamikeco kaj koreco. La scienc-praktikan memorkonferencon en Stara Zagora partoprenis altaj sociaj reprezentantoj. Ĝi okazis en tre digna kadro, kiu donis okazon ankaŭ al la eksterlandaj reprezentantoj salutparoli kaj tiamaniere honori la kontraŭfaŝisman batalon de la bulgara popolo de distrikturbo, kalkulanta ĉ. 130 000 enloĝantojn. Ankaŭ la akcepto flanke de la ĉefurbestro kaj ties ĉarma anstataŭantino restos en agrabla memoro de ni eksterlandanoj.

Mia partopreno en la konferenco donis memkompreneble ankaŭ la eblecon kontaktiĝi kun multaj reprezentantoj de alilokaj bulgaraj grupoj kaj konatiĝi kun la varieco de BEA. La rezulto i. a. estis, ke sufiĉe granda nombro da gebulgaroj vizitis nian IREBIK-aranĝon ĉiseptembre en Krossinsee ĉe Berlin. Se oni devas paroli pri iu vermutguto dum tiu-ĉi vizito, entute daŭrinta de 9a ĝis 17a de junio, tiam pri la konata, fatala besto, nomata „krokodilo . . ." Jen mia peto al miaj estimataj bulgaraj geamikoj: Se flanke de Esperanto-organizo oni aranĝas **inter**nacian aranĝon, tiam oni uzu ankaŭ la **inter**nacian lingvon Esperanto en la internacia rondo — malgraŭ la fakto, ke bulgaroj kaj ekz. rusoj tre facile komprenas unu la alian en siaj gepatraj lingvoj.

Sed por ĉio — koregan dankon pro la agrabla, amikeca prizorgo kaj etoso dum la tuta restado! Achim Meinel

Seminarioj por kadruloj 1983

Baza seminario por kadruloj de GDREA okazis de 24. — 29. 4. 1983 en Lychen. Partoprenis 25 personoj. Prelegantoj estis d-roj Dahlenburg kaj Blanke; Wera Dehler, Achim Zettier kaj Hans-Joachim Borgwardt.

En la tempo de 6. — 11. 11. 1983 okazis la 10a Junulara Seminario same en Lychen. Partoprenis 24 gejunuloj. Gvidis le seminarion Michael Lennartz.

En la tempo de 20. — 25. 11. 1983, denove en Lychen, okazis plue seminario por kursgvidantoj kaj aktivuloj de la Esperanto-Asocio. Partoprenis ĝin 21 personoj, kaj gvidis la seminarion Achim Zettier. Prelegis Wera Dehler, d-ro Detlev Blanke, Achim Zettier kaj Werner Pfennig.

GDR-numero de Paco 1983

Ankaŭ ĉijare aperis la jam tradicia GDR-numero de „Paco", 40-paĝa, kun ilustraĵoj, presita sur bonega papero.

Ĝi enhavas i. a. partojn de la Politika Deklaro de la ŝtatoj de Varsovia Traktato, intervjuon kun la inventinto de la „neŭtrona bombo" („Mi opinias ĉiujn homojn abomenindaj"), eltiraĵo el „Pentagon-studaĵo 1984 — 1988 — instrukcio por totala milito", superrigardon pri la minacata biosfero en Vjetnamio. Krome la kajero entenas studon de Robert Muller, iama sekretario de ECOSOC (kiu parolis 1979 en Lucerno dum la Esperanto-Kongreso!) pri edukaj celoj, materialon pri Karl Marx en Londono kaj omaĝon al Martin Luther. Ankaŭ ĉi-foje ne mankas literaturaĵoj (poemoj de Erich Weinert, Johannes R. Becher, Louis Fürnberg, Goethe, Eminescu, Brecht kaj rakonto de Wolfgang Borchert). La centra faka kontribuo estas la elstara movadpolitika studo de Renato Corsetti kaj Maŭro La Torre „Celoj kaj politikoj en la Esperanto-movado" (p. 25 — 30). Krome enestas la fama letero de Gorki pri Esperanto, artikolo pri ĝendarma persekuto de Esperanto en la cara Rusio kaj du studoj de Canko Murgin („Zamenhof pri la internacilingva ideo" kaj „pri generalo Mangado").

La kajero estas ricevebla ĉe GDREA (prezo: 1 marko).

Ĉiĉeronoj por Vintra Olimpiko 1984

Vizitantoj de la 14a Vintra Olimpiko okazonta en februaro 1984 en Sarajevo (Jugoslavio) havos eblecon ricevi diversajn servojn ankaŭ en la Internacia Lingvo. Turista Asocio de Sarajevo antaŭnelonge kapabligis grupon da ĉiĉeronoj por Esperanto, membroj de la E-Ligo de Sarajevo. Ankaŭ en aliaj aktivecoj la Turista Asocio utiligos Esperanton. En la plano estas eldono de E-glumarko, presigo de tekstoj en Esperanto en kelkaj prospektoj kaj aperigo de adreso de E-centro en broŝuroj kaj similaj publikaĵoj pri la Olimpiko. Vizitantoj de la Olimpiko estas afable petataj kontakti la E-centron en Sarajevo: strato Vase Pelagića 8/I (proksime de la konata hotelo „Evropa"), tel. (071) 37—043.

Konferenco pri metodiko

La sciencteknika fako de la Estona Filio de ASE okazigis la 17an de aprilo 1983 en Tallinn konferencon pri la temo „Teoriaj kaj metodologiaj aspektoj de Esperanto-instruado". Prelegis 9 fakuloj.

Redakcia informo

Bedaŭrinde ankoraŭ ne finiĝis la aperkrizo de „der esperantist". Ni ŝanĝis la presejon, kio kompreneble rezultas malfacilojn.

Ni tamen esperas, ke la legantoj fidos al ni, ke baldaŭ ni denove havos pli normalan eldonritmon de nia revueto. La red.

Recenzoj

DEFENDI LA PACON, PREVENTI NUKLEAN MILITON —

Proponoj de Soveta Unio en la Dua Speciala Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN pri malarmado: Eldon. Asocio de Sovetiaj Esperantistoj/ Sovetia MEM-sekcio; Moskvo 1982, 76 p.

En tiu ĉi broŝuro la sovetia MEM-sekcio prezentas la Esperanto-tradukon de gravaj dokumentoj pri la persista batalo de Soveta Unio por konservi la pacon. Temas pri jenaj dokumentoj:

— Mesaĝo de L. I. Breĵnev al la Dua Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN pri malarmado, en kiu li solene proklamis la decidon de Soveta Unio, ne uzi la unua nukleajn armilojn;

— Parolado de A. A. Gromyko je la 15-a de julio 1982 en la sama loko, en kiu li detalege prezentas kaj klarigas la eksteran politikon de Soveta Unio, direktitan al konservado de la paco, al haltigo de la vetarmado, speciale rilate la nukleajn armilojn, kaj al iom-post-ioma malaltigo de la nivelo de armiteco per traktadoj kaj intertraktitaj konvencioj;

— Memorando de USSR prezentanta la sovetian opinion pri solvendaj problemoj kaj la vojoj al ilia solvo, por elimini la kreskantan nuklean minacon kaj por bridi la vetarmadon;

— Bazaj tezoj de Konvencio pri malpermeso kaj fina neniigo de kemiaj armiloj;

— Gazetara konferenco de A. A. Gromyko je la 21-a de julio 1982 en Nov-Jorko, en kiu li, post enkondukaj rimarkigoj, respondas la demandojn de reprezentantoj de amaskomunikiloj.

Ne necesas substreki la politikan gravecon de la prezentitaj materialoj, kaj la sovetiaj esperantistoj meritas plenan laŭdon kaj aprobon, ke ili disponigis tiun tradukon al la internacia esperantistaro, precipe al tiu en okcidentaj regionoj,, en kiuj oni kutime ne tre klopodas disvastigi la veron pri la sinteno kaj celado de Soveta Unio.

Krom tio, la broŝuro vekas intereson ankaŭ en lingva rilato, ĉar la materialoj entenas la tutan politikan terminaron de niaj tagoj. Sed tiurilate la broŝuro ŝajnas ne tute kontentiga. La uzitaj nocioj (ekz. raketoj de surtera baziĝo, rimedoj de avangarda baziĝo, flugilhavaj raketoj por granda distanco k. a.) ja estas kompreneblaj, sed ofte ŝajnas trovitaj sen deca konsidero de la internacie kutima dirmaniero. Certe ĉiu politike informita leganto komprenas el la kunteksto, ke „blokado" estas tio, kion la anglalingvanoj nomas „freeze" kaj la germanoj „Einfrieren". Nu, kial ne preni la samsencan Esperanto-vorton „frostigo" (eble eĉ „fridigo")? Aliakampe ja oni ankaŭ parolas pri frostigitaj aŭ tradiciaj armiloj (kontraste al la nukleaj), sed la tradukintoj preferis la senkoloran esprimon „ordinaraj armiloj".

Se oni celas la tutan arsenalon de la nukleaj armiloj, oni devus paroli pri „nukleaj armiloj" aŭ „nuklea armilaro", sed ne nur pri „nuklea armilo", same pri „kemia armilaro" aŭ „kemiaj armiloj" kaj ne pri „kemia armilo". Rimedoj, per kiuj oni volas estigi konfidon inter la ŝtatoj, certe estas „konfidigaj rimedoj", ne nur „(kon)fidrimedoj". Kaj per „submarino-raketportantoj" la tradukintoj certe celas „raketportantajn (aŭ: raketekipitajn) submarŝipojn". Apud la trafa „malarmado" troviĝas okaze „senarmiĝi" kaj „malarmiĝo". Kaj certe oni devas supozi sub „gardaranĝoj" protektajn disponojn aŭ aranĝojn.

Ankaŭ ĝenerale la lingvaĵo kelkloke efektas iomete ruse, ne nur pro la evidenta necerteco en la apliko aŭ neapliko de la difina artikolo, sed ankaŭ

— en la vortelekto; ekz. elpaŝi (anstataŭ pledi, engaĝiĝi) por io; bruliga (anst. urĝega) problemo; penetrita (anst. saturita, kaptita) de zorgo; malmagnetigi (anst. neŭtraligi, malfortigi) la volon; sindevigo (anst. devontigo, devoligo); malelekte (anst. senelekte); militteatro (anst. militejo); informacio (!, anst. inform-aĵ-o); ŝtatulo (anst. ŝtatisto) k. a.

— en la traktado de kelkaj transitivaj verboj" ekz. anonci pri programoj (anst. anonci programojn); minaci al Soveta Unio (anst minaci Sovetan Union); impresiga (anst. impresa) k. a.

— en nekutimaj elipsoj kaj dirmanieroj; ekz. Se restarigi la veron, necesas agnoski ... (anst. Por restarigi la veron aŭ Se oni volas restarigi la veron); Temas pri minaca armilo, precipe se konsideri la atingojn de la scienco (anst. ... precipe se oni konsideras ...); ajne bona estu la rezolucio (anst. Kiel ajn bona estu ...) k. a.

Tamen, malgraŭ tiu ŝajna multnombro la lingvaj rimarkoj tute ne malgrandigas la valoron de la prezentita traduko, kiu entute transdonas la komplikajn kaj malfacile tradukeblajn tekstojn en komprenebla kaj flue legebla formo. Estas nepre dezirinde, ke la materialo atingu kiel eble plej vastan legantaron en Esperantujo.

D-ro Karl Schulze ⟨†⟩

Maks kaj Moric,
Bildrakonto de Wilhelm Busch en traduko de Wilfried Hofmann
Eldonis Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR
Karl-Marx-Stadt 1983. 15 x 21 cm, 18 p.

Ĉiu germanlingvano konas tiun spritan bildrakonton pri la bubaĵoj de Maks kaj Moric, kiuj tamen finiĝis tragike. Jen la moralo.

„Sume: Ĉie en la vilaĝo
cirkuladas la mesaĝo:"
„Fine ĉesis la serio
de l'bubaĵoj ‚Dank' al Dio!"

Ni danku al Wilfried Hofmann, ke li aŭdacis esperantigi tiun historion. Li majstre solvis tiun taskon.

L. Schödl

Ni publikigos nur tajpitajn koresponddezirojn!

Pollando

Studentino, 22j., dez. kor. tutmonde: Elzbieta Strug, ul. Jasna 17, **41—506 Chorzów.**
Poŝtoficisto, 20j., dez. kor. tutmonde kun gejunuloj pri muziko, sporto, kol. bk, pm: Leszek T. Kluza, **88—140 Gniewkowo,** ul. Torunska 17d, woj. Bydgoszcz.
Oficistino, 31j., dez. kor. tutmonde pri arto, muziko, literaturo, historio: Barbara Dabrowska, ul. Barona 17/1, **82—300Elblag.**
— Jerzy Cheda, **26—600 Radom,** ul. B. Chrobrego 26 m 15, 25j., pri junulara muziko, turismo, sporto
— Danuta Drozdz, **26—600 Radom,** ul. Slowackiego 57 m 21, 24j., pri filmarto, junulara muziko, turismo
— Wieslaw Giermakowski, **26—640 Skaryszew,** ul. Zermoskiego 6, 32j., pri sporto, turismo, filmarto, filatelo
— Zdzislaw Pajak, **26—600 Radom,** ul. Sportowa 9 m 24, 46j, inĝeniero, pri turismo, historio
— Barbara Panzcyk, **26—600 Radom,** ul. Daleka 23/38 m 55, 24j., pri historio de arto, psikologio
— Dorota Nachyla, **26—600 Radom,** ul. Wojciechowskiego 15, 22j., pri geografio, turismo, sporto, filmarto
— Anna Patynowska, **26—600 Radom,** ul. Gagarina 13/17 m 36, 35j., pri muziko, turismo.

Soveta Unio

Junaj gekursanoj el **295 540, Zakarp. Vinogradovo,** dez. kor. tutmonde:
— Viktoria Gajdoŝ, str. Vajda 2, (12j.)
— Andrea Milovaru, Lenina placo 26, (12j.)
— Katarina Kovaĉ, str. 50 let oktobro 2/32, (12j.)
— Elemér Kovaĉ, str. 50 let oktobro 2/32, (13j.)
— Nadija Gajdoŝ, str. Vajda 2, (13j.)
— Gabriela Keresteny, str. 50 let oktobro 6/32, (12j.)
— Zoltan Fabian, str. 50 let oktobro 3/39, (12j)
Komencanto, 27j., dez. kor. tutmonde, kol. bk, kalendaretojn, kuirreceptojn: Askár Moldaĥeneétov, **466 400 Balikši,** str. Kizilaskérskaja d. 29, l. 41, Kazaĥio.
Junulo dez. kor. tutmonde pri muziko, filatelio, kol. pm, bk, diskojn: Gintaras Žiaunys, Žemeitijos 9—25, **235 500 Mažeikiai,** Litovio.
Dentkuracistino, 50j., dez. kor. tutmonde kun kuracistoj: Usiene Liuda, **234 910 Utena,** Sudeikiu gt. 3, Litovio.
Lernantino, 15j., dez. kor. tutmonde pri bestoj kaj naturo, kol. bk: Audrone Baltruŝayte, **234 910 Utena,** Komunary gt. 75—15, Litovio.
Flegistino, 45j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Baltruŝaitiene Elena, **234 910 Utena,** Komunaru gt. 75——15, Litovio.
Edukistino en infanĝardeno, 26j., dez. kor. tutmonde: Regina Bartaŝeviĉiute, Utenos raj. **234 900 Saldutiškio Vaiku darzelis,** Litovio.
17jara knabino, dez. kor. kun gejunuloj pri moderna muziko, literaturo, kol. bk, pm: Natalie Šapkina, **454 001 Čelabinsk,** Sverdlovskij pr. 41—2.
Manafov Islam, **374 701 Kirovábad,** ul. Faĥrad Alijeva 7—32, Azerbajĝano, 22j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.
Igor Kovalov, **357 560 Pjatigorsk,** Lubĉikovili 11, dez. kor. tutmonde, p. ĉt. t.
Studento, 18j., dez. kor. pri arto: Andreo Popov, **603 011 Gorkij L — 11,** prosp. Leninina, d. 7, k. 1, kv. 57.
Sekretario de la klubo „Voko" dez. kor. kun gejunuloj el GDR p. ĉ. t.: Feliks Školnik, **210 001 Vitebsk,** Lokomotivnaja 16, kv. 22,
30j. inĝeniero dez. kor. pri literaturo, kol. bk, E-kantojn: Vladimir V. Ĉarin, poŝtkesto 933, **252 087 Kievo 87,** Ukrainio.
46j. laboristo dez. kor. p. ĉ. t. tutmonde, kol. bk: Adolf R. Leiter, str. Kalinina, d. 60, l. 13, **258 800 u. Hristinovka,** Ĉerkasa regiono, Ukrainio.
Heino Puri, Pikk 84—6, **Tartu,** Estonio, 40j., dez. kor. pri muziko, kol. pm, insignojn.
Instruistino, 24j., dez. kor. tutmonde: Marina Tokareva, **442 130 Penzenskaja obl.,** u. N. Zomov, ul. Ostrovskogo, d. 5, kv. 2.
Instruisto, 24j., dez. kor. tutmonde: Vladimir Komarov, **442 600 Penzenskaja obl.,** u. Bednodemjanovsk, ul. Lenina, d. 13, kv. 1.
Juna inĝenierino dez. kor. tutmonde pri lingvoj, moderna vivo: **440 045 u. Penza,** ul. Kronŝtadtskaja 2, kv. 288, Tatjana Berns.
Studentino dez. kor. tutmonde: Nailja Umjarova, **431 460 Mordovskaja ASSR,** u. Ruzajevka, ul. Lenina, d. 81, kv. 854.
Laboristino, 23j., dez. kor. p. ĉ. t.: Galina Fedosejeva, **443 020 u. Kujbišev,** ul. Leningradskaja d. 98, kv. 1.
Agronomo dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Edmund Jahn, **202 950 Abja-Palucja,** p. k. 11, Viljandi raj., Estonio
Grupo de 10 — 13j. gelernantoj dez. kor. tutmonde. Komuna adreso: Klubo „Leninec" (Esperanto), Staĉki 180/1, **Rostov-Don — 90.**
Inĝeniero, 27j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Vasil Voroblevskij, **290 054 Lviv,** Ribalko 9a-1, Ukrainio
Pensiulino, 58j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Linda Arukaev, **202 130 Pajustisjk,** Rakvere rajoon, Estonio
Instruistino, 24j., dez. kor. p. ĉ. t.: E. J. Viburyte, Utenos raj. **234 911 Tauragnai,** Litovio
Instruistino, 26j., dez. kor. p. ĉ. t.: J. D. Augulyte, Utenos raj, **234 911 Tauragnai,** Litovio

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redakitonskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16